

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo Kebekia

2025: 1-2 | ISSN: 0827-3154

# Lumo





*Fotoj: Ĵenja Amis*

# De la redakcio

Kio diable okazas en Usono? Mi scias, ke la kovrilo de tiu ĉi numero estas iom provoka. Sed ĝi bone reprezentas la enhavon de tiu ĉi *Lumo*. Mi scias, mi scias. Kelkaj, eble, diros, “ni, esperantistoj, devas esti neŭtralaj pri politiko”. La politika neŭtraleco estas, kial UEA ne kondamnis la militon en Ukrainio nek aliajn militojn...

Nu, nia statuto ne postulas politikan neŭtralecon pri la mondaj aferoj, kaj tio donas al mi, kiel redaktoro de *Lumo*, liberon kondamni, absolute kaj senrezerve, la okazaĵojn en Usono.

Kiam pogromoj skuis Orientan Eŭropon en la fina 19-a jarcento, Zamenhof nomis ilin “bedaŭrindaj okazaĵoj”, sen nomi ilin per ilia propra vorto: pogromo. Li timis cenzuron. Li timis, ke lia pozicio malhelpos al Esperanto. Li timis, ke, nomante aferojn per iliaj propraj nomoj, li eble haltigos la sukceson de Esperanto kaj metos negativan etikedon de “judeco” al sia kara projekto, kiu celas la mondan pacon.


Ĵenja Amis kun la Statuo de Libereco, ŝajne laca pro Trump. Fotita dum la festivalo *Juste pour rire* en Montrealo, 2018

Mi estas dankema, ke mi ne devas nun danci ĉirkaŭ vortoj. Mi kondamnas Trump kaj lian faŝisman registaron kaj kiel laboranto de la kanada federacia registaro, kaj simple kanada civitano, kies landon la usona prezidento ŝajne volas akapari. Mi kondamnas Trump kaj trumpismon kiel redaktoro de *Lumo*, kiel honora membro de KEA, kiel esperantisto kaj — jes! — ankaŭ kiel usona civitano.

Kiam ni diskutas, kio okazas sude de nia landlimo dum manĝopaŭzoj en mia laborejo, miaj kolegoj ofte petas klarigojn — mi ja loĝis en Usono dum kvin jaroj. Ili demandas ne pri tio, KIO okazas. Ni ĉiuj vidas tion en novaĵoj. Ili volas scii, KIAL. Kial homoj elektis Trump? Kial oni povas daŭre subteni lin? Ĉu pro needukeco? Naiveco? Usona esceptismo? Eble ĉio ĉi kaj pli...

Dum mi kondamnas la usonan registaron, mi zorgas pri usonaj esperantistoj, multaj miaj amikoj jam de du jardekoj, kaj pri usonanoj ĝenerale, kiuj suferas kaj suferos pro la Trump-uragano, sed kiuj plejparte ne elektis lin — kaj tion ni ne forgesu...




## KER-ekzameniĝu!

**La unua ekzamendato estas la 11-a de julio, ĝi ligiĝas al la Dulanda Kongreso en Toronto kaj al la ĵus antaŭa Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK).**

La ekzameno okazos fine de NASK kaj komence de la Dulanda Kongreso.

Paralele kun la ĉeestaj ekzamenoj **eblos solvi ankaŭ rete la testojn** kaj tiel tra la tuta amerika kontinento kaj en la proksimaj tempozonoj oni povos labori en komforta, dumtaga temp-intervalo.

En tiu tago okazos ekzamenoj je niveloj: **B1, B2** kaj **C1**.

## Memorigilo: gravaj datoj

- **16-a de majo 2025:** VARIE — Virtuala Amerika Renkontiĝo Inter Esperantistoj. Virtuala kunveno por esperantistoj el Amerikoj!
- **17-19-a de majo 2025:** MeKaRo: Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto
- **5-14-a de julio 2025: NASK (5-11-a de julio) + Dulanda Kongreso (11-14-a de julio) en Toronto**
- **26-a de julio — 2-a de aŭgusto 2025:** Universala Kongreso de Esperanto. **Notu ke La laborgrupo pri Projekto Ellenberger (inkluzive de la filino de Henri Ellenberger, Irène Ellenberger) prezentos la projekton kadre de la kongreso!**
- **Aŭtuno 2025:** KVaK. Ebla temo: **Esperanto kaj kinoarto** (sama ĉefa temo por *Lumo* 3-4 2025!)

## KEA havas novan statuton!

Koran dankon al la estraro kaj aparte al Geoffrey Greatrex, kiu preparis la novan statuton de KEA, kaj al ĉiuj, kiuj voĉdonis por ĝi. Ĝi estis unuanime aprobita, kun 25 voĉoj. La nova statuto haveblas en la retejo de KEA: esperanto.ca/statuto/

# Bonvenon al Otavo en majo

***Otavaj esperantistoj invitas vin al la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) 2025, en la ĉefurbo de Kanado, de la 17-a ĝis la 19-a de majo. Tio okazos dum la Tulipfestivalo kiam la urbo estas plena de florĝardenoj, kiam piediri estas la plej ŝatata okupo.***

MeKaRo estas kunveno de Esperanto-parolantoj ĉefe de Kebekio kaj Ontario, kiu okazas ĉiujare dum la longa semajnfino de la Nacia Tago de la Patriotoj (Journée nationale des patriotes) en Kebekio kaj Tago de Viktoria en la ceteraj provincoj). Temas pri turisma kaj socia semajnfino. Kutime oni sufiĉe multe promenas (depende de la vetero) kaj vizitas muzeojn aŭ gravajn historiajn lokojn. Ni ne forgesu ankaŭ mencii, ke kutime ankaŭ estas vespera programo!

Ĝi okazas alterne en Kebekio kaj Ontario, ĉiufoje en malsama urbo. Partoprenas ĝin multaj homoj de ambaŭ provincoj sed ankaŭ multaj usonanoj.

Vidu la liston de antaŭaj gastigantaj urboj en **Vikipedio**. **Aliĝu** ĉe mekaro.ca. Se vi havas demandojn, sendu retmesaĝon al Guy Matte: guymatte450@gmail.com








# Usonanoj baldaŭ invados Kanadon

## *La Ondo de Esperanto*

**Malgraŭ akraj vortoj kaj komerca milito inter la du landoj, la Esperanto-diaspora komunumo montras, ke la frateco inter kanadanoj kaj usonanoj ankoraŭ vivas en Nordameriko. Esperantistoj el la du landoj kuniĝos por la Dulanda Kongreso de Esperanto 2025 en julio, gastigita de Esperanto-Toronto kaj kunorganizita de Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj Esperanto-USA. Fidele al la celo de Esperanto, ĉi tiu renkontiĝo celas kunigi diversajn homojn por antaŭenigi pacon kaj reciprokan komprenon.**




"La kongreso enfokusiĝos pri lingvo kaj kultura konekto, montrante Esperanton kiel ponton inter diversaj komunumoj", – deklaris Garry Evans, prezidanto de KEA. – "En malfacilaj tempoj kiel nuntempe, Esperanto substrekos kiel ordinaraj homoj povas harmonie kunekzisti, sendepende de la insultoj kaj bataloj, kiujn politikistoj lanĉas. Esperanto estis kreita kiel internacia lingvo por antaŭenigi pacon, komprenon kaj kamaradecon, kaj se vi rigardas nian diversan komunumon tra Nordameriko, estas klare, ke ĝi plene sukcesis en tiuj temoj".

Brandon Sowers, prezidanto de Esperanto-USA, rimarkis: "Kun varma koro, ni, usonaj esperantistoj, akceptas la inviton veni al Toronto ĉi-jare. Ni okazigos komunan dulandan kongreson ĉi-somere kun niaj nordaj kamaradoj kiel signon de solidareco inter usonanoj kaj kanadanoj. Nia komunumo ĉiam kuniĝis fronte al

malfacilaĵoj. Hodiaŭ, estas pli grave ol iam ajn montri, ke ni, kiel homoj, povas transcendi politikajn disputojn per spirito de amikeco kaj komunumo".

Kutime la du landaj asocioj organizas apartajn landajn kongresojn; la kuna kongreso lastafoje okazis en Viktorio, Brita Kolumbio, en 2014. Ĉi-jare organizantoj decidis pri kuniĝa evento por montri solidarecon dum malfacila politika etoso. La oficiala temo de la Toronto 2025 Dulanda Kongreso estas "Amikeco trans landlimoj", elektita intence por kontraŭstari la retorikon inter politikistoj.



"Malsame de etnaj lingvoj, Esperanto ne apartenas al iu ajn nacio aŭ etna grupo", rimarkis Andy Blair de Esperanto-Toronto. "Ĉiu povas fariĝi esperantisto kaj parto de nia diasporo simple lernante la lingvon… sed pro malsamecoj kun tradiciaj etnaj nacioj, la publiko en Nordameriko ofte ne komprenas, kiel ni povas fariĝi komunumo, nek pri nia komunuma identeco. La mirinda afero estas la forteco de la komunumo, malgraŭ tio, ke ni samideanoj devenas de ĉiuj nacioj kaj vivmanieroj".

"Se homoj de ĉiuj rasoj, religioj kaj naciecoj povas kuniĝi en forta komunumo trans landlimoj, tio montras al niaj usonaj kaj kanadaj samlandanoj, ke ĉio estas ebla. Kaj oni ne devas sekvi la politikojn de divido, kiujn hodiaŭ oni tro ofte aŭdas", – li aldonis.

La Dulanda Kongreso, okazonta en Toronta Metropolitena Universitato (TMU) de la 11a ĝis la 14a de julio, promesas allogajn prelegojn, diskutojn, muzikon, libro-foiron kaj libro-lanĉojn, kulturan programon, Junularan programon kaj Infanan-Adoleskantan programon, ekskursojn, kaj multe pli. Okazos ankaŭ semajn-longa intensiva Esperanto-kurso: la plentempa Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en la sama loko ekde la 5a ĝis la 11a de julio. Oficialaj KER-ekzamenoj estos haveblaj por tiuj, kiuj volas



certigi sian lingvo-nivelon, de B1 ĝis C1 niveloj.

“La vigla, kosmopolita urbo Toronto estas ideala loko por Esperanto-kongreso”, konkludis Blair. “Toronto estas tre internacia: pli ol la duono de la loĝantaro de nia urbo naskiĝis eksterlande, do oni povas aŭdi dekon da diversaj lingvoj eĉ dum mallonga bus-veturado. Tre verŝajne, Toronto estas la plej multkultura urbo en la mondo, kaj ekzistas multegaj rektaj flugoj al urboj en Eŭropo kaj la tuta mondo. Ni bonvenigas ĉiujn samideanojn el la mondo por partopreni la Dulandan Kongreson, kaj viziti nian buntan urbon”.

## Pri Esperanto en Kanado kaj Usono

En Kanado kaj Usono, la historio de Esperanto komenciĝis antaŭ 1900 kaj daŭre prosperas. La Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA gvidas klopodojn por antaŭenigi la instruadon kaj kulturon de Esperanto. En la lastaj jaroj, kombino de enretaj kaj surlokaj eventoj allogis novulojn, alportante freŝan energion kaj kreskantan bazon de junaj entuziasmuloj al la movado.

## Por pliaj informoj:

Garry Evans, prezidanto, KEA: tel. +1 514-594-3645, garryoevans@gmail.com
Brandon Sowers, prezidanto, Eo-USA: tel. +1 770-823-4458, brandon.sowers@esperanto-usa.org
Andy Blair, kunordiganto, Esperanto-Toronto: tel. +1 902-717-2639, ahblair@yahoo.com
John Huang, sekretario, Esperanto-Toronto: tel. +1 -902-488-2588, info@toronto2025.net
Dulanda Kongreso: www.toronto2025.net/
Oficiala Kongresa kanto: on.soundcloud.com/GbTVMvWyFWEsQ8bQ6
Nord-Amerika Somera Kursaro: nask.org/
KER-Ekzamenoj: edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

**Unue aperis en *La Ondo de Esperanto* (marto 2025)**

# “Kiel vi fartas nun kaj kiel vi vidas la situacion en Usono”

### *Ĵenja Amis*

Ĉi-aprile, kiam mi pripensis la temon de tiu ĉi *Lumo*, mi venis al la jena konkludo: en tiu ĉi momento mi ne povas paroli pri kio ajn alia ol tio, kio okazas sude de ni, en Usono. Do mi skribis al kelkaj amikoj el Usono kaj petis, ke oni respondu la jenan demandon: “Kiel vi fartas nun kaj kiel vi vidas la situacion en Usono?”

Multaj homoj respondis. Aliaj pardonpetis kaj klarigis, kial ili ne povas respondi: por la plejparto, tio estas afero de sekureco. Mi memoras aparte la jenan respondon: “Mi timas, ke homoj en brunaj uniformoj aperos ĉe mia domo, ĵetos min en prizonon kaj bruligos miajn Esperantajn librojn”.

Mi dankegas al ĉiuj, kiuj respondis, ĉu indikinte sian nomon aŭ anonime. Mi esperas, ke la protestoj, la kuraĝaj vortoj kaj aktivismo portos fruktojn, eĉ se aferoj aspektas sufiĉe sinistre nun. Vi legos poste admonon de Tomaso Alexander, ke ni, kanadanoj, ne forgesu, ke ni havas amikojn en Usono. Kaj ni mem ne forgesu esti bonaj amikoj al esperantistoj sude de ni, pluraj el kiuj suferas pro Trump... Do, mi volas fari la peton al niaj samideanoj en Kanado — demandu de tempo al tempo al viaj amikoj en Usono, kiel ili fartas. Mi esperas, ke aferoj neniam iros ĝis tie... Sed se tiel okazos, ke samideanoj de Usono estos en situacio de danĝero, ĉu pro seksa orientiĝo, politika sinteno, partopreno en manifestacioj — ni estu pretaj helpi kaj malfermi niajn domojn por rifuĝintoj kaze de bezono... Kaj ni esperu... ni esperu, ke tiu bezono neniam alvenos...



**Skulptaĵo “La Enmigrintoj” (de Luis Sanguino, Novjorko)**

# “Memoru, ke vi havas amikojn en Usono”

## *Thomas Alexander*

Ĉu mi bone fartas? Nu. “Farto” ĉiam estas relativa, kaj estas multaj aspektoj de la vivo – kaj en kelkaj aspektoj aferoj iras pli glate ol en aliaj.

Antaŭ ĉio, mi volas danki al *Lumo* pro la demando. Ekde mia esperantistiĝo en 1997, unu kerna afero de nia lingvo por mi estas la internacia amikeco kun miaj najbaroj el la nordo. Mi ankoraŭ pensas pri 2017, kiam kelkaj amikoj anoncis, ke ili ne revenos al Usono ĝis kiam ni havos novan prezidenton. Mi kontaktis unu el tiuj amikoj kaj diris, ke la usonaj esperantistoj bezonas vin nun pli ol iam ajn. La reago estis pli-malpli: tio estas via problemo ĉar vi elektis malbonan prezidenton.



Mi elektis. Mi mem? Nu.

Pri la nuna situacio, mi kredas, ke kanadanoj estu koleraj. Mi mem estas kolera. Ĝis mi ricevis tiun demandon de *Lumo*, mi forte sentis, ke miaj esperantistaj najbaroj forgesis, ke ili havas amikojn en la sudo. Refoje, dankon pro via demando kaj via zorgo. Mi scias, ke ni havas amikojn, kaj tio estas grava.

Mi kaj mia familio bone fartas, sed mi multe zorgas. La vivo estas bona kaj festinda, kaj ni havas multajn aferojn por festi. Ĉiuj estas sanaj. Mia edzino finis edukan programon kaj fariĝis flegistino je la aĝo 51. Mia labora situacio estas pli stabila ol en 2017. Mia filo havas bonan laboron kaj propran loĝejon. La aliaj familianoj fartas bone.

Aliflanke, estas multe da necerteco. Niaj ŝparaĵoj malaperas maldank' al la senvaloriĝo de la akcioj. Ĉio estas pli multekosta. Mi zorgas pri tio, ĉu kelkaj ĉiutagaĵoj aŭ gravaj aferoj simple ne estos haveblaj. Dum mi tajpas ĉi tion, mi ricevis tekst-mesaĝon de mia edzino pri unu el niaj veturiloj. Ĉu ni renovigos la aŭtoŝildon? Nu, tio dependas de la progreso de la situacio en Usono.



**ARE-2016: kanadanoj kaj usonanoj kune.**
**Tomaso estas en la centro**

Kaj krom la ekonomia situacio, mi hontas. Mi hontas kaj timas, ke la reĝimo sendas laŭleĝajn loĝantojn el Usono eksterlanden sen taŭga proceso. Nu, sen ia ajn proceso. Tio en si mem estas abomeninda, sed kio sekvos? Mi hezitas troigi mian reagon, sed foje mi sentas, ke mi devos elekti inter troigita reago kaj freneziĝo. Mi ankoraŭ esperas, ke ni povos korekti la nunan situacion. Ke ni povas forpeli la nunan reĝimon.

De tempo al tempo mi demandas min, kiam ni devos fuĝi el nia lando kaj kien. Tio ankoraŭ ne estas la situacio, sed mi ne plu opinias, ke ĝi estas neeblaĵo.

En 2017 mi provis diri al la kanada esperantistaro "ni bezonas vin nun pli ol iam ajn", sed nun mi havas alian mesaĝon. Restu tie. Memoru, ke vi havas amikojn en Usono, sed estu kolera. Ni revu pri estonta tago, kiam ni povos plani komunajn eventojn, sed tiu tago ne estas hodiaŭ.

**Tomaso estas fondinto de Jutuba Kanalo Esperanto Variety Show (rimedoj por anglalingvanoj, muziko, ktp.): youtube.com/@EsperantoVarietyShow, instruisto de Esperanto kaj longtempa organizanto de Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE).**

# Poemoj pri problemoj pro prezidento

## *Russ Williams*

Ne eblas koncize priskribi ĉiujn miajn pensojn kaj sentojn pri la multegaj malutilaj malmoralaj kontraŭleĝaj aferoj, kiujn Trump faraĉas en sia dua prezidenta mandato. La listo simple tro longas kaj ampleksas. Ĉiu observanto probable havas propran subliston de la persone plej ŝokaj kaj maltrankviligaj fiagoj, ĉu temas pri la arestado pro falsaj akuzoj kaj senprocesa deportado de enmigrintoj al brutala malliberejo en Salvadoro, ĉu minacoj kaj arestoj de nesubemaj juĝistoj, ĉu minacoj al ĵurnalistoj, ĉu malferma korupto kaj invito donaci ŝmirmonon per la bitmono $Trump, ĉu diversa ekologia damaĝo kaj neado de klimata krizo kaj plano bruligi pli multan "belan puran karbon", ĉu la jura malekzistigo kaj senrajtigo de transuloj, ĉu amasaj maldungoj de miloj da registaraj dungitaj sciencistoj kaj medicinistoj kaj multaj aliaj gravaj laboristoj, ĉu la amasa forigo de inaj kaj neblankulaj kaj gejaj historioj el muzeoj kaj registaraj retejoj, ĉu la plurkampa senscia neado de scienco, ĉu la anstataŭigado de kompetentaj spertaj kvalifikitaj homoj per lojalaj lakeoj, ĉu la idiote sensencaj kaj ekonomie damaĝaj tarifoj, ĉu la perfido al Ukrainujo, ĉu la konstanta subemo kaj admiro al Putin kaj similaj diktatoroj, ĉu la frenezaj minacoj ekposedi Kanadon kaj Gronlandon kaj Panamon kaj Palestinon, ĉu la eksplicite deklarita intenco plu resti prezidento post 2028, ktp ktp... Nu, mi povus longe daŭrigi.

Oni supozis, ke la dua mandato de Trump estus pli malbona ol la unua, sed mi ne imagis, kiel rapide kaj terure tio okazus. Demokratio montriĝas pli fragila, ol oni volis kredi. En "normala" epoko, eĉ unu el tiuj aferoj estus granda skandalo, kiu eksigus la prezidenton (kiel okazis al Nixon pro Watergate), sed nun ĉiutage estas nova pli terura, damaĝa, korupta, idiota afero. Certe, kiam ĉi tiu teksto aperos, jam estos novaj okazaĵoj, kiujn mi estus menciinta... Kaj lia partio subeme akceptas kaj obeas kion ajn li faras, rifuzante oponi. Por ili, resti en partia posteno klare pli gravas ol leĝoj,

> **"Demokratio montriĝas pli fragila, ol oni volis kredi"**

justeco, kaj la bonfarto de Usono kaj de la cetera mondo. Ĉio tio des pli malĝojigas, ke laŭ opinisondoj signifa proporcio, eble triono, de Usono plu aprobas kaj subtenas lin. Tio kaŭzas multan pesimismon pri la estonteco kaj pri la homaro. Simile oni vidas kreskantan subtenon al "fortaj gvidantoj", diktatoraj, en multaj landoj nuntempe. Evidente, nia infana raso malbone lernas lecionojn de historio.

Kiel koncize esprimi reagon al ĉio ĉi? De jaroj mi kutimas verki taglibrecan poemeton ĉiutage. Nuntempe, tiuj ofte temas pri Trump... Jen hajkoj ekde lia dua mandato.

***2025-01-20***

**Mallumaj tagoj.**

**Nun venos de Trump agoj,**

**ne plu nur blagoj.**

***2025-01-21***

**Ve! Sankta skombro!**

**Jam pro Trump disvastiĝas**

**malluma ombro.**

***2025-01-22***

**Ku-Kluks-Klan-anoj**

**aktivas en Usono;**

**grandaj Trump-fanoj.**

***2025-01-23***

**Dekretoj tekstas**

**fuŝe; Trump uzis AI,**

**oni suspektas.**

***2025-01-28***

**Venas ruino**

**per Trumpa apliko de**

**la ŝokdoktrino.**

***2025-01-31***

**La krizo ardas;**

**homoj ŝokite staras**

**kaj nur rigardas.**



***2025-02-05***

**Musk la fiulo**
**klopodas fermi ĉion**
**per manipulo.**

***2025-02-07***

**Kvazaŭ Rusio,**
**Usono iĝas fuŝa**
**kleptokratio.**

***2025-02-08***

**Arto, scienco,**
**leĝoj, financoj, ĉio**
**en dekadenco.**

***2025-02-12***

**Trumpa decido**
**cedi al Putin estas**
**fia perfido.**

***2025-02-15***

**Multaj klopodas**
**disvastigi faŝismon;**
**ĝi nun tre modas.**

***2025-02-19***

**Nun Trump ponardas**
**ukrainojn. Por helpi**
**Putin li ardas.**

***2025-02-21***

**La MAGA-sekto**
**detrueme marŝas en**
**stulta direkto.**

***2025-02-24***

**Kreskas torento**
**de feko el la buŝo**
**de l’ prezidento.**

***2025-02-28***

**Mi vere hontas**
**pri la konduto de Trump.**
**Kio plu ontas?**

***2025-03-03***

**La mondo aĉas**
**kaj optimismo raras,**
**sed hejme plaĉas.**

***2025-03-07***

**Fluas ĉikanoj**
**kaj minacoj de Trump al**
**aliancanoj.**

***2025-03-08***

**Virina tago.**
**Landa defendo estas**
**heroa ago.**

***2025-03-09***

**Trumpa akcelo**
**de korupto kreskas al**
**nova nivelo.**

***2025-03-16***

**Policaj fortoj**
**maljuste uzataj por**
**amasdeportoj.**

***2025-03-25***

**Alia tago;**
**alia de Trump nova**
**hontinda ago.**

***2025-04-04***

**Trumpaj tarifoj:**
**firmaoj kraŝos kiel**
**ŝipoj sur rifoj.**

***2025-04-05***

**Trumpaj malbonoj**
**ne ŝanĝas, ke aprobas**
**lin kvar dekonoj…**

***2025-04-09***

**Pli laŭtas zumoj**
**de trompitaj de Trump en**
**retaj forumoj.**

***2025-04-18***

**Ŝoka torento**
**de kontraŭleĝaj agoj**
**de l’ prezidento.**

***2025-04-28***

**Ĉu Trump sincere**
**kredas kion li diras?**
**Vere mistere.**

# “Usono alproksimiĝas al punkto, kiam ni devos decidi, ĉu ni volas ankoraŭ esti demokratia lando aŭ ne”

***Anonimulo***

Mi unue volas peti pardonon de niaj bonaj amikoj en Kanado kaj aliaj landoj pro la ĥaoso, kiun nia nuna registaro kreas. Mi konas multajn usonanojn, kiuj kun hororo spektas la fajron nuntempe kaj serĉas kiel estingi ĝin.



Mi emeritiĝis je la komenco de la jaro, vivas nun per mia laboreja pensio kaj atendas la baldaŭan komencon de mia Socia Sekureco, t.e. la registara pensio. Ĉi-momente, finance ni fartas sufiĉe bone, sed mi zorge atentas la borson, ĉar la laboreja pensio estas investaĵoj, kaj la politikan situacion, pro la registara pensio. Kaj la tarifoj kaj aliaj malicaj agoj pliigas kostojn kaj malpliigas fidon en la ekonomio. Mi provas faradi sinzorgadon, pro anksio.

Mi ankaŭ sekvas la novaĵojn pri loĝantoj, ĉu kun dokumentaĵo aŭ sen, kiuj estas arestitaj, deportitaj aŭ, pli malbone, senditaj al fremda malliberejo, sen ia ajn kortuma proceso. Kaj la diroj de nia registaro, ke ili ankaŭ ŝatus sendi usonajn civitanojn al tiaj fremdaj malliberejoj. Vere malluma epoko en nia historio.

Mi pensas, ke Usono alproksimiĝas al punkto, kiam ni devos decidi, ĉu ni volas ankoraŭ esti demokratia lando aŭ ne. La nuna registaro incitas krizon post krizo, kaj per ĉiu ago provas puŝi el leĝa regado. Ili ŝajne volas rekonstrui nian registaron kaj nian kulturon en ion alian ol ĝi estis dum la lastaj du jarcentoj kaj duono.

Ili forbruligas la servojn de nia registaro, atakas bibliotekojn kaj neregistarajn organizaĵojn, senrajtigas virinojn, GLATanojn kaj minoritatojn. Samtempe ili daŭre dividas nian loĝantaron en apartajn frakciojn, kiuj timas kaj malfidas unu la alian. Mi konas multajn usonanojn, kiuj estas ĉagrenitaj kaj timas pri la direkto, kien nia lando nuntempe iras. Ankaŭ mi.

# "Mordeton post mordeto, oni povas prepari nin por pripensi la antaŭe-nepenseblan"

*D-ro Robert L. Read, PhD*

Usonon nuntempe plenigis kaoso. Multaj homoj publike manifestaciis la kvinan de aprilo 2025, kie mi mem partoprenis en Aŭstino, Teksaso, Usono. Mi vidis multajn afiŝojn pri diversaj gravaj problemoj: justico, tarifoj, privateco, Elon Musk, rajtoj por transuloj kaj samseksemuloj, enmigrado, deportado, kontraŭleĝeco de la agoj de la registaro, korupteco ktp. Fakte, multaj bonkoruloj konfuziĝas pro la multeco de la misfunkcioj de nia registaro. Mi kaj miaj amikoj deprimiĝis. Plej bona metodo por klopodi kontraŭ la kaoso ankoraŭ ne videblas.



**Manifestacio kontraŭ Trump, la kvinan de aprilo 2025, Aŭstino, Teksaso**

Mi opinias, ke longtempaj problemoj venos, ĉar la registaro maldungis multajn registarajn dungitojn senplane kaj hazarde. La diktatorecaj agoj de la nuna Prezidento Trump estas kontraŭkonstituciaj, sed la juĝistaro agas pli malrapide ol la registaro, kaj tro malrapide por halti ĝin. Krom la fuŝegado, Usono verŝajne malsubtenos Ukrainion, kaj ĝi malhomrajte minacas Gazaon, Gronlandon kaj Panamon – eĉ Kanadon!

Geamikoj de Kanado, mi elkore sciigas vin, malgraŭ tio, ke vi eble jam scias tion: la plejparto de homoj en Usono maldeziras detrui aŭ damaĝi

la suverenecon kaj sinregecon de Kanado. La Prezidento mem neniam publike menciis tiun ideon antaŭ ol li apenaŭ venkis en la balotado de novembro 2024. Plejparto de ni komprenas, ke Kanado helpegas nin pri la protektado de nia 3 000-mejlojn longa norda landlimo. Kelkaj el ni memoras la batalon de Juno-plaĝo dum la Dua Mondmilito je D-Tago…

Tamen, la danĝero al nia interrilato veras. La Prezidento jam indikis, ke li volonte malhelpos Kanadon per iloj ekonomikaj. Li jam metis en danĝeron, se ne rompis, la fortan aliancon inter niaj landoj, la formalan aliancon de NATO kaj la malformalan aliancon de longtempa amikeco. Mi supozas, ke subita milito ne eblos nune; usonanoj ĝin nun malakceptos. Tamen, mordeton post mordeto, oni povas prepari nin por pripensi la antaŭe-nepenseblan... Ekzemple, la ĉikanema estro, kiu amas atenton kaj dramecon, povus kapti malgrandan senhoman insulon. Mi supozas, ke li agos kontraŭ Gronlando aŭ Panamo antaŭ ol Kanado.

Trump ĉiam estis neantaŭvidebla, kaj eble nuntempe li ne havas bonajn konsilistojn. Eble li malsanas mense. Eĉ se usonanoj havas grandan amikecon kaj reciprokajn ekonomiajn celojn kune kun kanadanoj, la Prezidento eble ne samopinias kaj havas la tujan povecon por detrui multegon kaj ege ĝeni multajn kanadanojn. Eble, la leĝo kaj juĝistaro finfine lin regos, sed ili agos metodike kaj malrapide. Bedaŭrinde, kontraŭ miaj sentoj, mi devas averti vin, ke ĉio ĉi povos okazi.

Mi tamen petas, ke ni ĉiuj memoru la amon, kiun ni kutime havis inter nia landoj kaj inter niaj homoj. Memoru, ke la Prezidento, eĉ se oni lin elektis, ne ĉiam esprimas la volon de la popolo de Usono.

**Robert Read estas fondinto de Pubic Invention (Aŭstino, Teksaso): usona senprofitcela organizo, kiu antaŭenigas inventadon kaj novecajn teknologiojn por servi al la homaro.**

## Li pavimas sian vojon sur la dorsoj de la civitanoj


***David Beck***

Mi malamas la situacion. Trump maldungis milojn da homoj, detruis la borsmerkaton, detruis la emeritiĝajn fondusojn de homoj kaj lasis ĉiun kompanion, kiu vendas objektojn, batali por supervivi. Li pavimas sian vojon sur la dorsoj de la civitanoj. Li estas psikoza monstro.

# “Donald Trump ne okazis dum unu nokto”

*Timothy Boronczyk*

Mi ne havas ĉeflaboron (kiel programisto) ekde novembro; nur kromlaboron ĉe benzinejo. Miaj timoj temas pri la ekonomio, la teĥnologia industrio kaj Musk. Mia koramiko estas denaska usonano, sed havas meksikan parencon. Mi timas, ke li estos elsendita el la lando.



Mia patro diras pri la DOGE-maldugintoj (1): “Fojfoje devas okazi maldungiĝoj”. Eble jes, sed ne tiam, kiam oni ne faris ion ajn malbonan. Malfeliĉigas min lia malkompata sinteno – li ne estis tia antaŭe.

Mia fratino timas pri la estoneco por mia nevino... sed ŝi estas nur 3-jaraĝa. Mi esperas, ke ĉio pliboniĝos antaŭ ol ŝi pliaĝas.

Mi avertus kanadanojn: gardu vian landon. Vi havas la samajn problemojn, kiujn ni havis. “Frostigaj mortigoj” en Saskatuno (2), la Coalition Avenir Québec (3), eĉ Doug Ford... solvu tiujn problemojn, antaŭ ol ili pligrandiĝos. Ĉar Donald Trump ne okazis dum unu nokto...

*Notoj*

*1) DOGE (Department of Government Efficiency): usona termino, kiu signifas “departamento de registara efikeco”.*

*2) “Frostigaj mortigoj”: mortoj pro la fiaj agoj de la saskatuna polico en la 1990-aj kaj fruaj 2000-aj jaroj, kiu arestis homojn, ĉefe indiĝenajn kaj ĉefe virajn, ofte en la stato de ebrio aŭ sen ajna kaŭzo entute, veturigis ilin ekster la urbon kaj lasis morti pro frosto. Neniu policano estis trovita kulpa en tiuj krimoj.*

*3) Coalition Avenir Québec estas populisma dekstrema partio nun (2025) ĉe la povo en Kebekio. Je la nomo de sekurigo, ĝi efektivigis plurajn leĝojn kontraŭ enmigrantoj kaj diversaj minoritatoj kaj severe bremsis la enmigradon al Kebekio.*

# “Kio okazos al miaj amikoj?”

*Randy Dean*

Por multaj, ŝajne, nenio granda ŝanĝiĝis en Usono, krom ke la prezoj estas pli altaj. Sed ĉie estas konfuzo, kaj multaj aferoj ŝanĝiĝas en unu tago kaj fojfoje reŝanĝiĝas post kelkaj tagoj. Ni ne plu povas dependi de io ajn. Ŝajnas, ke neniu leĝo povas supervivi la decidojn de nur unu homo.




Trump regas per ekzekutivaj ordonoj. Komence, nur la rajtoj de transgenruloj kaj enmigrantoj (precipe azil-petantoj kaj studentoj) ŝrumpis. Nun Trump diras, ke li eĉ volas enprizonigi eksterlande eĉ “denaskulojn” (do, civitanojn naskitajn ĉi tie) sen ajnaj rajtoj – eĉ ne rajto je proceso. Li provas uzi eksterleĝajn povojn por regi universitatojn en plej etaj detaloj de iliaj studprogramoj kaj reguloj. Li ankaŭ timigas novaĵagentojn kaj advokatojn. Li uzas eksterleĝan “departementon” DOGE por limigi la jam aprobitan uzon de la registara mono, inkluzive de la helpo por la plej malmultehavantaj homoj kaj por mondaj sanprogramoj.

La lando ne plu havas amikojn en la mondo, post kiam li atakas (unue voĉe, poste ekonomie) niajn plej bonajn amikojn, kiel Kanadon. Ĉu fizikaj atakoj iam estos konsiderataj? Li sekvas la paŝojn de Putin, kiun li admiras, kaj Orban el Hungario. Li ankaŭ havas tendencon mafiestran, kiun li lernis en Novjorkurbo. Ni apenaŭ havas parlamenton – la respublikanaj reprezentantoj ne volas agi kontraŭ li. Tio eĉ ne pritraktas la ekonomian koston, kiun ni alfrontos pro la tarifoj. Estas espero, ke eble post du jaroj novaj parlamentaj elektoj ebligos iom da oficiala opozicio. Sed ĉu vere estos justaj elektoj? Kiu scias?

Persone, krom la malaltigo de miaj ŝparoj en la bankokonto, estas zorgo pri la estonteco – mia plej forta emocio. Kiel la afero progresos? Ĉu ni ne povos iam (ne tro fore estonte) libere vojaĝi al aliaj landoj kaj reveni? Ĉu mia edzeco kun alia viro baldaŭ ne plu estos leĝe respektata? Kio okazos al miaj amikoj?

# “Mi hontas pri mia lando”

## *Steven Farrington*

Estas surreala tempo esti en Usono. Neniam antaŭe, krom eble en novembro 2016, mi tiom timis pri la estonteco de demokratio en mia lando. Tamen, ekzistas signoj de espero kaj rezisto kontraŭ la minaco de faŝismo kaj maltoleremo.



Unu el la plej frustrigaj kaj malĝojigaj aferoj pri la vivo ĉi tie en Usono en la lasta jardeko estas vidi homojn, kiujn vi ŝatis kaj iam respektis, kredi al la retoriko de malamo, netoleremo kaj kontraŭdemokratiaj tendencoj.

Eĉ homoj, kiuj devus scii tion – eĉ kelkaj esperantistoj — falis en la kulton de Trump. Estas homoj en mia pli vasta familio, homoj, kun kiuj mi kreskis, kun kiuj mi apenaŭ plu parolas pro tio, kiun ili subtenas politike.

Mi havas kolegojn en la lernejo, kie mi instruas, kiuj subtenas Trump. Kiel geja viro edziĝinta al enmigrinto el Latin-Ameriko, kiel mi povus ne preni tion persone? Kiel mi povus ne igi tion, kio estas persona, ankaŭ politika?

Mi hontas pri mia lando. Mi tiel bedaŭras pro tio, kio okazis, kvankam mi faris mian parton subtenante la demokratan opozicion laŭ ĉiuj manieroj, kiujn mi povis, en la lasta balota ciklo.

Mia edzo vivas en konstanta timo esti forprenita de la stratoj kaj ĵetita en teruran deten-centron. Li estas laŭleĝa enmigrinto, usona civitano, sed li estas brunkolora kaj parolas kun akĉento, do li ne plu sentas sin sekura ĉi tie. Kiel mi povas konsoli lin kaj diri, ke ĉio estos en ordo?

Tamen, estas signoj de espero. Milionoj da homoj partoprenis en protestoj grandaj kaj etaj. La aproba nivelo de Trump malaltiĝas, kaj verŝajne ni

iras al recesio pro lia ĥaosa “gvidado”. Mi esperas, ke ni povos venki la trumpismon unufoje por ĉiam baldaŭ, kaj reveni al la komunumo de raciaj nacioj.

Dume, bonvolu scii, ke malgraŭ ĉio, kio okazas, tiuj kiuj subtenas tiun faŝisman reĝimon estas malplimulto en mia lando. Ni devas travivi ĉi tiun ŝtormon — sed ni ja travivos ĝin.

Mi ne kulpigas kanadanojn kaj aliajn pro bojkoti Usonon. Mi mem farus tion. Igi ĉi tiun landon suferi finance estas, bedaŭrinde, la sola maniero, por ke multaj usonanoj komprenu la mesaĝon: Trump estas ŝarlatano kaj malsukcesinta gvidanto.

**Steven Farrington estas instruisto kaj verkisto. Liaj libroj estas aĉeteblaj, interalie, per [Amazon]**

---

# “Mi komencis eĉ cerbumi, kiuj landoj estus taŭgaj por translokiĝi, se aferoj malpliboniĝos eĉ pli”

## *Anonimulo*

Se la demando estas “Kiel vi vidas la nunan situacion en Usono?”, mia respondo estas simpla kaj unuvorta: zorgiga. El persona vidkpunkto, mi fakte antaŭvidas, ke en la venontaj jaroj mi perdos rajton, kiun mi nun havas: nome, la rajton esti laŭleĝe edziĝinta al mia edzo. Krome, kiam mi parolas la hispanan al miaj infanoj surstrate, mi ĉiam havas ioman timon, ke iu fanatika konservativulo povus subaŭskulti kaj reagi malafable aŭ eĉ perforte. Revenante hejmen el



Kanado, delonga amika lando, mi nun min zorgigas, ke povus okazi ia ĉikanado fare de la usonaj landlimaj agentoj ĉu pro mia politika sinteno, ĉu pro mia portorika deveno — malgraŭ tio, ke mi estas denaska usona civitano. Mi komencis eĉ cerbumi, kiuj landoj estus taŭgaj por translokiĝi, se aferoj malpliboniĝos eĉ pli — io, kion mi neniam antaŭe sentis la bezonon serioze konsideri.

Aferoj estas jam malbonaj por multaj

enmigrintoj —ĉu laŭleĝaj aŭ ne— kaj baldaŭ ili malpliboniĝos eĉ por ĉiuj, kiuj povus eĉ iomete "aspekti" kiel enmigrintoj. La registaro pli kaj pli forigas la fidon de la civitanoj je la jur-sistemo, kaj ĝi pli kaj pli agos ekster tiu kadro sen ajna konsekvenco. Mi antaŭvidas, ke homoj, kiuj nun forte defendus demokration kaj la bezonon havi taŭgan jur-sistemon, iom post iom, pelataj de la nuna prezidanto, forlasos tiujn idealojn kaj pli kaj pli simple pravigos ajnan lian agon; post dek jaroj ilia kred-sistemo estos esence nerekonebla disde la nuntempa.



La plej zorgiga afero estas tio, kiom da relative junaj homoj ŝajnas subteni la nunan registaron: se estus nur afero de maljunaj konservativuloj, oni povus pensi, ke post iom da jaroj la afero povus ŝanĝiĝi... sed eĉ se homoj, kiuj daŭre voĉdonos dum la venontaj kvardek jaroj, estas kontentaj pri la nuna sistemo, nenio ŝanĝiĝos memstare.

Mia sola espero estas tio, ke la lastatempaj (kaj senduba ankaŭ la estontaj) decidoj de la nuna registaro estos tiel tuje kaj memevidente malbonaj, ke ili komencos efiki negative eĉ sur la nunaj subtenantoj – do, ilia persona intereso, finfine, velkigos ilian apogon.

Mi konscias, ke mi ne sentus fari ĉi tiun mesaĝon same sekura ne-anonime, ĉar mi timas, ke aferoj iĝos eĉ pli malbonaj, kaj ke la registaro kutimos spuri homojn en sociaj retejoj por ekscii pri ilia politika sinteno kaj agi laŭe. La fakto, ke mi havas tiun timon eĉ en la lando fama pro ties onidira libereco de sinesprimo, estu la sola pruvo al eksteruloj, ke por multaj usonanoj la afero jam komencis serioziĝi kaj ne ŝajnas iri en la ĝustan direkton.

Mi ŝatus fini ĉi tiun artikolon pli pozitive, sed bedaŭrinde mi ne povas. Espereble, tamen, la historio malpravigos min, kaj mi aspektos kriĉa trozorgemulo: nenio feliĉigus min pli!

# “Pli kaj pli, tiu, kiu troviĝas en utero, estas persono; tiu, en kiu utero troviĝas, ne”

## *Anonimulo*

Sentiĝas en Usono, ke ĉio, kio estas plej aminda pri nia lando, estas grave endanĝerigita. Kaj ne en la kutima maniero, per neglekto kaj subtenmanko – sed nun aktive, perforte.

Oni ne supozu, ke la spertomanko de la ministraro malsukcesigu la klopodon… ili mirige superregas ĉian kapablomankon. Aŭ, eble, pli honestas konfesi, ke ĉiu efektive tute taŭgas por la tasko… detrui la departementon, al kiu ĉiu el ili estis nomumita. Por vidi, kiom efike ili progresigas sian planon por Usono kaj la mondo, vizitu la retejon project2025.observer. Eble oni ne supozu, ke ili aŭdacis listigi publike ĉion, kion ili esperis.

Kion mi diru de mia perspektivo?

– Certe, la lingva afero ŝiras mian koron. La fia forkaptado de homoj ŝajnis komenciĝi per sendokumentuloj, sed jam eĉ civitanoj estas sendataj al detenejoj, foje pro la uzo de la hispana.

– Ekonomia detruo ne estas nur monda fenomeno, sed ankaŭ persona. Jes, tarifaro forigis kvin bilionojn da usonaj dolaroj el la borso ene de tri tagoj, je unu flanko; sed je alia, familioj pli kaj pli pruntas monon el financaj institucioj por sia ĉiutaga pano, ĉu por ingrediencoj por hejmkuirado aŭ ĉu simpla manĝo el rapidmanĝejo.

– La klopodoj senigi inojn de rajtoj akceliĝas… pli kaj pli, tiu, kiu troviĝas en utero, estas persono; tiu, en kiu utero troviĝas, ne. Transuloj kaj neduumuloj estas nur unu procento de usonanoj kaj estas sub atakoj de la registaro… Sed tamen por distri la popolon de tiu unu procento, kiu posedas tiom, kiom la suba 90%, la respublikana partio elspezis 415 milionojn da dolaroj en 2024 por akiri voĉdonojn. Jen la plej malnova artifiko de faŝistoj: distri per dividado.

Usono jam de jardekoj ne havas sociajn kutimojn, morojn, eĉ disvastigitan scion inter la popolo, kiel trakti tian situacion. Ni tamen de tempo al tempo ja sukcesis insisti pri homaj rajtoj. Sed la bezono de la momento estas tre granda. La energio kaj politika volo povas kreski nur iom post iom, sed ĝi nepre kreskos iom post iom, ĝis kiam tio sufiĉos. Ĝis ni ĉiuj povos kompreni: “Sufiĉu jam!”

# Pri fideleco en tempo de milito



***Mark Fettes***

Miaj unuaj lernejaj jaroj pasis en Usono. Malmultaj detaloj restas en mia memoro, sed mi daŭre kapablas parkere deklami la Ĵuron de Fideleco, kiun ni ĥore recitis ĉiumatene starante fronte al granda flago kun ruĝaj kaj blankaj strioj, kun kampo de blankaj steloj sur blua fono.

*mi ĵuras fidelecon al la flago de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko*
*kaj al la respubliko, kiun ĝi simbolas,*
*unu nacio sub Dio, unuiĝinta kaj nedisgebla,*
*kun libereco kaj justeco por ĉiuj*

Estis brunhaŭta knabo en la klaso, kiu ĉiam endormiĝis ĉe sia skribotablo. Indiano de la rezervejo, laŭ la knabaj paroloj. Mi ne sciis, kio estas indiano.

Pri indianoj tamen rakontis la historia lernolibro. Kaj en la legopaŭzo, la instruistino elektis legi al ni rakonton pri kuraĝaj blankaj setlantoj, kiuj devis defendi sin kontraŭ sovaĝaj atakoj de la lokaj tribanoj. Mi komprenis, ke la historio konsistas el luktoj kaj venkoj. Usono estis la lando de la venko.

Ĉar mi jam flue legis, dum miaj samklasanoj pene deĉifris enkondukajn tekstojn, mi rajtis vagi tra pli defiaj legaĵoj. Mi legis pri George Eliot Carver, la inventinto de arakida pasto, kaj Eli Whitney, kies kotonseparilo transformis la agrikulturan bazon de suda Usono. Mi legis pri la astronaŭtoj, kiuj antaŭnelonge promenis sur la luno. Usono estis evidente ankaŭ la lando de scienco kaj progreso. Mi decidis fariĝi sciencisto.

Okazis elektokampanjo. Ŝajne estis grave decidi, kiun el la du flankoj oni subtenas. Miaj britaj gepatroj, anoj de Amikoj de la Tero kaj la Klubo Sierra, malŝatis la prezidenton. Ili decidis, ke ni elmigros al Novzelando. Tie mi aŭdos pri la skandalo Watergate, kiu faligos Nixon. Usono estis la lando de demokratio, kie eĉ prezidento devas submetiĝi al la leĝoj, kaj ĵurnalistoj kuraĝe elspuras la sekretojn de la potenculoj.


**La slogano de Google "Don't be evil" (Ne estu fia) estis forigita en 2015 post la restrukturigo sub la ombrelo Alphabet Inc.**

Pasis kelkaj jaroj. Veninte al la Universitato de Brita Kolumbio por doktoriĝi pri molekula genetiko, mi engaĝiĝis en la movado kontraŭ nukleaj armiloj. Dum kelka tempo mi regule legis artikolojn el *The New York Times,* kaj komencis kompreni, kiel aspektas la mondo tra imperiaj okulvitroj. Mi renkontis la maksimon de Lordo Acton: "Ĉiu povo koruptas; absoluta povo koruptas absolute". Mi eksentis la profundajn dividojn en la usona socio, inter nordo kaj sudo, blankuloj kaj nigruloj, riĉuloj kaj malriĉuloj. "Usono estas la lando de duismoj", iam diros al mi berklia profesoro. "Pri ĉio ili sukcesos konstrui du reciproke oponajn flankojn".

La Malvarma Milito venis al fino. Usonaj teknologiaj firmaoj fundamentis mondan revoluicion en la komunikado. "Ne estu fiaj", proklamis la devizo de Google. Barack Obama, la unua nigrahaŭta prezidento, citadis inspirajn vortojn de Lincoln kaj King. "La arko de la morala universo estas longa, sed ĝi kurbiĝas al justeco".

Samtempe usonaj aviadiloj bombis geedziĝajn festojn en Afganio, kaj amasmortigoj en usonaj preĝejoj kaj lernejoj kaj muzikfestivaloj elvokis nur "pensojn kaj preĝojn" de la parlamentanoj. Ŝrumpis laborsekureco, interalie ĉar sindikatoj perdis influon en la kondiĉoj de industria tutmondiĝo kaj la kresko de la kontrakta ekonomio. Kia lando estis Usono nun? Neniu havis klaran respondon.

Venis la epoko de "kulturaj militoj". Ĉio estas furaĝo por ili: vakcinoj, aborto, pafiloj, transgenreco, klimata scienco, civitaneco, la brutaleco de policistoj. Kiel en ĉiuj militoj, la vero estas la unua viktimo. Montriĝas, ke multaj preferas "alternativajn verojn" se ili konfirmas la proprajn konvinkojn. La etimologio prilumas tion: la lando de la venko fariĝis la lando de la kun-venko, de "ni veraj usonanoj" kontraŭ "la aliaj".




**La balota mapo de Usono de 2020 kaj 2024**

Kio okazis al tiu revo pri lando "unuiĝinta kaj nedisigebla"? Nu, tiuj vortoj mem estas produkto de milito de la tradicia speco, batalado inter du armeoj, en kiu malvenkis la Konfederacio de la sudaj ŝtatoj, kies ekonomio baziĝis sur sklavlaboro. La industria Nordo postulis kapitulacon en 1865, kaj ĝia ideologio de unueco fariĝis oficiala tra la tuta lando. Sed milita venko ne signifas animan venkon. Diversrimede la konfederacia kulturo persistis, evoluis, disbranĉiĝis. Fine venis tempo por venĝo.

La usona liberalismo influis la tutan mondon; ĝi estis la pela forto malantaŭ la kreo de la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj, kiun ni nun konas simple kiel UN; ĝi helpis starigi la sistemon de internacia juro, inkluzive de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj; ĝi fariĝis preskaŭ sinonima kun moderneco dum sesdeko da jaroj post la Dua Mondmilito. Nun ĝi ĉesis regi en la propra lando. Kio anstataŭos ĝin? Neniu scias.

Konvinkoj estas nur portempa anstataŭaĵo de la realo. La ekonomio ne obeas la kapricajn dezirojn de Trump, nek la klimato cedas al la skeptiko de liaj sekvantoj. Usonanoj, kiel aliaj homoj, plejparte deziras kunvivi pace. Sed la liberalismo, kiu promesis prosperon por ĉiuj, ne sukcesis liveri ĝin daŭre kaj sekure; dume, ĝi kreis la kondiĉojn por oligarka regado, teknologia manipulado kaj ekologia katastrofo. La solvoj ne kuŝas tie, eĉ se la liberalismo portas pli videble la standardon de libereco kaj justeco por ĉiuj. Eble la problemo ne kuŝas tiom en la liberala idearo mem, kiom en ĝia preteco kompromisi kun la povo. Se la usonaj voĉdonantoj ne estis konvinkeblaj pli amase subteni la Demokratojn en 2024, certe temas parte pri tiu prava percepto.

Malgraŭ la aktuala krizo, mi daŭre kovas admiron kaj fidon al la kapablo de la usona kulturo naski originalajn vojojn al individua kaj socia renovigo. Intertempe, tamen, multo detruiĝas: fido, institucioj, intelekta kapitalo, aliancoj. Nia mondo videble malriĉiĝas. Des pli grave, ke ni kultivu solidarecon kaj esperon, la kapablon kunimagi kaj kunkrei tiun respublikon de la spirito, kiu ne estas—malgraŭ la Ĵuro de Fideleco—afero de nacia identeco, sed de la tuta homaro.



**Mark Fettes estas profesoro pri edukado en la universitato Simon Fraser. Li estis redaktoro de la revuo Esperanto (1986-92), estrarano de UEA (1992-98), direktoro kaj estrarano ESF (2000-22), prezidanto de UEA (2013-19) kaj lastatempe direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj.**

## Konkurso “Plej bona reganto de Esperanto”: alvoko al landaj asocioj kaj individuoj

La unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) – pli konataj kiel la KER-ekzamenoj – estas la plej grava internacia Esperanto-ekzameno. Ĝi estas servo de UEA ofertata de ĝia KER-Ekzamena Centro (KER-EC) kunlabore kun la retejo Edukado.net kaj la Akademio de Esperanto. Ili ekzistas en la niveloj B1, B2, C1 kaj C2 kaj en la kategorioj nur skriba, nur parola aŭ kompleta (skriba + parola). Ĉiujn detalojn pri venontaj ekzamensesioj trovu ĉe uea.org/gk/1214.

Okaze de la sesio dum la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno, la 1-an de aŭgusto, specife por la nivelo C2 (ĉu surloke, ĉu samtempe rete) UEA starigas la Konkurson “Plej bona reganto de Esperanto”. Landaj asocioj kaj individuoj estas alvokataj partopreni!

Celo de la konkurso: la konkurso celas stimuli aliĝon de reprezentantoj de kiel eble plej diversaj landoj kaj premii la tri ekzameniĝintojn el malsamaj landoj, kiuj unuope ricevis la plej multajn poentojn. (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

# Tarifoj ĵetos la mondan ekonomion sur rifojn


*Garry Evans*

Malmultaj homoj, eĉ kanadanoj, iam aŭdis pri Saint-Pierre-et-Miquelon (*Sen Pier kaj Mikelon*), eta insularo, teritorio de Francio, apud la marbordo de Novlando en orienta Kanado. Sed ĝi fariĝis fama la duan de aprilo, ĉar ĝi ricevis (egale kun la afrika lando Lesoto) la plej altan tarifon (50%) proponitan de Prezidento Trump en sia "Libereca Tago" – la tago, kiam li enkondukis la tarifojn sur eksporto el aliaj landoj. Nu, ŝajne, temis pri eraro. Saint-Pierre havas preskaŭ nenian komercon kun Usono. En 2023, tamen, ĝia registraro aĉetis kelkajn aviadilajn partojn de Usono, sed ne bezonis ĉiujn. Do, en 2024 (la jaro, kiun oni uzis por kalkuli la tarifojn) ĝi resendis unu el la partoj al Usono, kaj tio estis kalkulita kiel eksporto.




La diversaj tarifoj proponitaj de Trump skuis la mondon dum la lastaj kelkaj semajnoj. Je la komenco, li proponis "reciprokajn tarifojn" de 10% ĝis 50% sur importoj al Usono el ĉiuj landoj kaj 145% por importoj el Ĉinio. La esceptoj estas Kanado kaj Meksiko – ili jam suferis de tarifoj sur aŭtoj, ŝtalo, aluminio ktp. kaj *ial* Rusio kaj Nord-Koreio... Post tiu komenca propono tamen Trump ŝanĝadis sian opinion, ŝajne, preskaŭ ĉiun duan tagon. *(Mi devis verki ĉi tiun artikolon la*

La Plej Altaj Tarifoj Ekde la 1930-aj





*tagon antaŭ la redakta limdato okaze ke la situacio refoje ŝanĝiĝus!)* Por la momento, usonaj importaj tarifoj restas je 10% (krom por Ĉinio) kaj, dum la sekvaj 90 tagoj, Trump kaj lia teamo "marĉandos" kun aliaj landoj, kiuj "petegas" (laŭ Trump) pli malaltajn tarifojn.

Kiu estos la rezulto de la tarifoj jam efektivigitaj al Usono? Ili altigos la averaĝan importan tarifon por varoj en Usono de ĉirkaŭ 2% ĝis 28% (tamen, en la realo tio eble ĝis *nur* 17%, ĉar eble firmaoj aĉetos varojn enlande aŭ de landoj kun la malplej altaj tarifoj). Sed eĉ tiu lasta elcentaĵo signifas tarifojn je la plej alta nivelo ekde la 1930-aj jaroj, kiam Usono praktikis "protektismon" per la Leĝo Smoot-Hawley, kiu laŭ multaj ekonomikistoj pliseverigis la Grandan Depresion tiam (**grafikaĵo 1**).

Bone, sed kio pri la mondo? Kiel grave tiuj tarifoj influos la mondan ekonomian kreskadon? Antaŭ la usonaj balotoj en oktobro pasintjare, la Internacia Monfonduso (IMF) kalkulis, ke 60%-a tarifo sur importoj el Ĉinio kaj 10%-a tarifo sur importoj el ĉiuj aliaj landoj malaltigus la usonan malnetan enlandan produkton (MEP) je ĉirkaŭ 1%, kaj tiu de Ĉinio je 0,5% (**grafikaĵo 2**).


Eĉ se la negocoj inter Trump kaj aliaj landoj glate iros, tiu ŝajnas eble la plej bona scenaro. Ĝuste pro tio, kiam la IMF eldonis siajn ĝisdatigitajn

IMF Antaŭvidas Ke Tarifoj Malaltigos MEP de Usono de 1% kaj de Ĉinio de 0.5%



prognozojn por la monda MEP de 2025 en aprilo, ĝi malpliigis ilin por la mondo je 0,5%, kaj por Usono je 0,9%, kompare al la prognozoj eldonitaj en januaro (**grafikaĵo 3**).

Tarifoj havas multajn malbonajn efikojn sur ekonomion. Ili estas kvazaŭ impostoj. Neniu ekonomisto kredas, ke tarifoj helpas iun ajn ekonomion, krom se oni uzas ilin en tre limigita kazo (ekzemple, se oni uzas ilin dum mallonga periodo por protekti novan industrion). Kiu pagas la tarifojn? Malgraŭ la kredoj de s-ro Trump, plej ofte estas konsumantoj, kiuj pagas. Eĉ se enlandaj produktantoj fabrikas la saman varon, tarifoj donas al ili ankaŭ la eblecon altigi siajn prezojn.




Sed en la kazo de importoj el Ĉinio, multaj varoj – aparte malmultekostaj – ne estas aĉeteblaj de usonaj produktantoj aŭ el aliaj landoj. Kaj se la importoj estas tiel nomataj “mezaj varoj” (*intermediate goods*) – ekzemple materialoj, kiel ŝtalo aŭ elektronikaj partoj – la pli altaj prezoj de tiuj malhelpas la rendimenton de usonaj firmaoj, kiuj uzas tiujn por produkti pli komplikajn varojn por vendi ilin enlande aŭ eksterlande.

La plej tikla problemo estas Ĉinio. Malsimile al aliancanoj de Usono, kiel Kanado, Japanio aŭ Britio, Ĉinio ne povos facile kompromisi. La usona registraro kvazaŭ petas al Ĉinio tute ŝanĝi sian ekonomian sistemon, per stimulo de konsumado, per altigo de la kurzo de la ĉina valuto ktp. Fakte, Ĉinio jam pretigis sian popolon por longa luktado kontraŭ Usono. Plue, ĝi lernis de la precedenco de Japanio en la 1980-aj, kiam en similaj cirkonstancoj Japanio cedis al petoj de Usono kaj lasis al la valoro de japana valuto duobliĝi kompare al la usona dolaro ene de unu jaro. Tio kaŭzis la ekonomian bobelon en Japanio, kiu krevis en la fruaj 1990-aj. La lando suferis la postefikojn de la bobela krizo dum la sekvaj 30 jaroj.

Ĉinio jam respondis kontraŭ la tarifoj de Trump: ĝi altigis siajn tarifojn por importoj en Ĉinion el Usono ĝis 125%. Poste, la Ĉinaj funkciuloj diris, ke ne valoras altigi ilin pli, ĉar je tiu nivelo preskaŭ ĉia komerco haltos. Sed Ĉinio daŭre havas aliajn kartojn, kiujn ĝi povus ludi. Ekzemple, multaj usonaj firmaoj (plej elstare, Tesla kaj Apple) vendas al ĉinaj konsumantoj varojn, kiujn ili fabrikigas en Ĉinio. Do, se la Ĉina registaro vere volus intensigi la batalon, ĝi facile povus ataki tiujn firmaojn. Kaj eĉ se Trump sukcesos fari negocajn aranĝojn kun aliaj landoj, oni malfacile povas antaŭvidi, kiel rapide li atingos konsenton kun Ĉinio.

***Bildoj: Generitaj de AI***




## Toronte Estonte

En tre speciala epizodo, la usonaj personoj esploras Toronton, la urbon kie okazos la Dulanda Kongreso kaj NASK en Julio. Ĉiĉeronas por ni Andy Blair kaj Jed Meltzer, du membroj de la LKK.

usonepersone.substack.com/p/36-toronte-estonte

## Tradukinto serĉas provleganton

Mi elangligis Lady Susan de Jane Austen, kaj nun serĉas spertulon, kiu akceptus ĵeti rigardon al mia laboro. Oni povas respondi al Stéphane Brault (truchement@hotmail.com).

## Kontribuu al *Lumo*!

Artikoloj bonvenas por kiu ajn temo! **La speciala emfazo de la sekva numero: Esperanto kaj Kinoarto**. Sendu viajn kontribuojn al: yevgeniya.amis@gmail.com

# Trump donis novajn argumentojn por Esperanto

**Redakcio:** ***La 28-an de februaro — la tago de nia kutima, lastvendreda montreala renkontiĝo en Resto-Végo, unu temo dominis nian babiladon: la fiaskan kunveno inter la prezidento Trump de Usono kaj prezidento Zelenskij de Ukrainio. La kunveno, kiu celis al la ellaboro de la pac-plano, prenis alian turnon… la turnon katastrofan por Ukrainio. Kelkajn tagojn en*** **Libera Folio** ***aperis brila analizo de la lingva dimension de tiu fifama kunveno (aŭ kaptilo?). Ni reproduktas tiun artikolon en*** **Lumo** ***— Red.***

***Marc van Oostendorp (Libera Folio)***

**Tra la mondo ni dependas de Usono en multaj internaciaj aferoj, kaj tio fariĝas aparte evidenta en momentoj, kiam Usono ne plu volas ludi la rolon de policisto sed tiun de mafiestro de la mondo. Tio validas ankaŭ pri la angla lingvo. Eble en ĉi tiuj malcertaj tempoj ne plu estas tiom absurda la ideo pri lingvo, kiu povus unuigi anstataŭ disigi la homaron, skribas Marc van Oostendorp.**

La usona prezidanto Donald Trump kaj vicprezidanto JD Vance lerte uzis la ilon de potenco nomatan “lingvo” dum sia renkontiĝo kun la ukraina prezidanto Volodimir Zelenskij lastvendrede. Ilia celo estis timigi kaj superruzi sian kunparolanton, kaj la fakto, ke la konversacio okazis en la angla, donis al ili klaran avantaĝon.

Aŭskultante anglalingvajn paroladojn de Zelenskij en la lastaj jaroj, oni rimarkas, ke li plibonigis sian lingvaĵon por pli efike plenumi sian diplomatian rolon. Ĉu Trump aŭ Vance regas alian lingvon krom la angla, restas nekonate. Ili profitis de sia denaska lingvo por starigi lingvan baron kontraŭ Zelenskij, kiu bezonis frakcion de sekundo pli por vortumi siajn pensojn. Tiun mallongan momenton la usonanoj lerte utiligis.

La mondo jam kutimiĝis al la angla kiel la lingvo de la internacia ordo – ŝajne neŭtrala ilo por



**Donald Trump parolas al Volodimir Zelenskij en la Blanka Domo. Foto: La Blanka Domo**

komunikado. Sed kiel la esperantistoj certe scias, tio signifas, ke la plimulto de la homaro devas lerni ĝin kun granda penado, nur por trovi sin superita de homo, kiu havas la naturan avantaĝon paroli sian denaskan lingvon.

Tra la mondo ni dependas de Usono en multaj internaciaj aferoj, ne nur lingvaj, kaj tio fariĝas aparte evidenta en momentoj, kiam Usono ne plu volas ludi la rolon de policisto sed tiun de mafiestro de la mondo. Multaj kernaj aspektoj de la interreto restas en usonaj manoj. Eŭropaj registaroj kaj entreprenoj stokas vastajn kvantojn da sentemaj datumoj en usonaj serviloj, kiujn usonaj aŭtoritatoj povas aliri sub certaj kondiĉoj.

Sed la sama problemo validas por la angla lingvo. Oni ofte prezentas ĝin kiel neŭtralan lingvon, sed kiel ni scias, ĝi estas la lingvo de malgranda grupo de ŝtatoj, kiuj devenas de la brita imperio. Donald Trump komprenas ĉi tiun potencon pli bone ol multaj: en la tago de la renkontiĝo kun Zelenskij, li dekretis, ke la angla fariĝu la sola oficiala lingvo de Usono.

Nun, kiam la monda ordo ŝanceliĝas, ni havas la ŝancon rekonstrui ĝin pli juste kaj demokratie – tiel ke ne unu sola popolo havu specialajn privilegiojn en internacia interagado. Alivorte, la klasikaj argumentoj de Zamenhof pri neŭtrala mondlingvo ree fariĝas aktualaj.

Dum longa tempo oni mokis tiun ideon, konsiderante ĝin naiva, ĉar la mondo ja elektis la anglan. Sed eble, en ĉi tiuj malcertaj tempoj, ĝi ne plu estas tiom absurda: lingvo, kiu povus unuigi anstataŭ disigi la homaron. Lingvo, kiu jam dum pli ol jarcenton funkcias en malgranda, sed dediĉita komunumo, kaj en kiu oni povas ĉion fari kion oni bezonas en internacia komunikado sur pli justa bazo.

Ĉu tio signifas, ke tiam ne plu ekzistus politikistoj, kiuj misuzas sian potencon? Ankaŭ pri tio ni jam trovis la respondon: kompreneble ne estus tiel. Sed unu potenca ilo estos forprenita el iliaj manoj.


[Libera Folio, marto 2025]

# Ni ploru... je rido!

***Ĵenja Amis***

Kiam ni ne povas ŝanĝi aferojn… ni ridu. Ni ridu pri okazaĵoj en niaj landoj kaj en la mondo. Ni ridu pri la registaroj...

Ne, karaj, mi ne estas naiva! Rido ne forigos la malbonaĵojn ĉirkaŭ ni. Ĝi ne magie malaperigos diktatorojn aŭ malfaros iliajn agojn. Ĝi ne neniigos militojn kaj sensencajn mortigojn. Do, ridi nure ne ŝanĝos la mondon — necesas jen alia elemento — necesas ago. Se oni vivas en lando, kie eblas voĉdoni, voĉdonu. Protestu. Sed… ankaŭ ridu! Rido suplementu la agadon, ĝi spicigu ĝin!




Rido estas formo de protesto kaj elmontro de kuraĝo. Rido estas potenca ilo. Ĝi montras la veron en alia lumo kaj kolerigas la povulojn. Ĝi forprenas iliajn maskojn kaj lasas ilin stari, kvazaŭ nudaj, antaŭ la publiko. La povuloj timu nian ridon, same kiel ili timu nian agadon!

Dum ni ridas, ni ankaŭ memoru tiujn, kiuj ridis antaŭ ni. Ekzemple, la kuraĝajn esperantistojn, kiuj eldonis, abonis kaj legis la satiran maldekstreman kaj kontraŭnazian revuon *La Pirato*, dum la mondo plonĝis en la mallumon de faŝismo en la 1930-aj...

Ĝia ĉefredaktado (“la ŝipestro”) estis Raymond Schwartz, franca bankisto, verkisto, poeto kaj pacifisto. Li fondis *La Piraton* nur kelkajn monatojn post kiam Hitlero venis al la povo, en 1933…

*La Pirato* aperis (aŭ kiel ili mem diris, “kaperis”) dum du jaroj, en 1933 kaj 1934. Ĝi mokis faŝistojn, naziojn, Hitleron kaj liajn lakeojn kaj ridigis esperantistojn en la tempoj, kiam rido povis kosti la vivon...

Ni proponas al vi kelkajn disajn erojn el *La Pirato*. Aparte notu la poemon *Malespero* —mi sentas, ke ĝi estis verkita kvazaŭ por ni, nun, kaj ne preskaŭ jarcenton antaŭe…

**Vi povas esplori la tutan kolekton rete ĉe Bitarkivo: [bitarkivo.org/gazetoj/pirato_la](bitarkivo.org/gazetoj/pirato_la)**

**Kion ili bezonas por esti feliĉaj.**

Hispano — bovbatalon.
Ruso — brandeton.
Franco — junan fraŭlinon.
Germano — praavinon arianan.

Laŭ konata muziko . . .

## LA MALESPERO

En la mondon venis nova krizo,
Tra la mondo iras la bojkoto,
Per flugiloj de la civilizo
Nun ni ĉiuj flugas al bankroto.

Jen Usono (ne plu soifanta),
Ĝi la monan ŝiras organismon,
Al la mond' eterne kreditanta
Ĝi promesas bankan kataklismon.

Sub la sanga signo de l' mizero
Kolektiĝas lacaj sav-talentoj
Kaj rapide kreskas la ofero
Per la boro de l' eksperimentoj.

Forte staras muroj de l' doganoj
Inter la popoloj dividitaj,
Sed ni ĉiuj saltas sur vulkanoj
Per la danca flamo ekscititaj.

Kun ŝakala digno, kun lamento
Kunprenante ĉiu sian bombon,
La popoloj faros sen konsento
Unu grandan mondo-hekatombon.

Niaj eminentaj registaroj
En parolo vana ne laciĝos,
Ĝis kruela sonĝo de l' barbaroj
Por eterna pen' efektiviĝos.

Tra-la-la-la, tra-la...

Rosa Meier.


## NOVA DIFINO

Esperanto: la juda universala lingvo.

## KAJ ORIGINALA VIDPUNKTO

« Tiel longe, kiel la judo ne estos la estro de l' aliaj popoloj, li devos — pli aŭ malpli volonte — paroli iliajn lingvojn; sed tuj, kiam la aliaj popoloj fariĝus liaj subuloj, ili devus ĉiuj lerni universalan lingvon — ekzemple Esperanton! — tiel, ke ankaŭ per tiu ĉi rimedo la judaro povu pli facile regi ilin. »

Citaĵoj el la libro « Mein Kampf » de Adolf Hitler.




« Brrr... estas malvarme! »

« Ĉu? — La polico devus monpuni tiujn farsulojn, kiuj afiŝas termometrojn por kredigi, ke estas malvarme.

## Feliĉan Novan Jaron!

« Ĉio en la mondo statas kiel eble plej bone. »

LEIBNITZ.




Ĉu katastrof'? Minac' de Mars'?
Hi-hi! Ha-ha! Nur klaŭna fars'!
Ni scias, ke el nigra bomb'
Eksplodos fine... pac-kolomb'!

# EL GERMANUJO

**La movado kontraŭ ne-arianaj kuracistoj kaj advokatoj.**

HITLERANO : « Ĉu vi estas aŭtentika ariano, D-ro Levi ? »
D-ro LEVI : « Sendube, mi ja vivas nur de miaj honorarioj. »
HITLERANO : « Kion tio pruvas ? »
D-ro LEVI : « Ke mi estas honor-ariano ! »

★

**Germanaj judoj post la “ manifestacio ” kontraŭjuda.**

Abraham Rosenblatt renkontas sian amikon Isidor Kohn, kiu estas riĉa sed ne tre instruita homo.

« Nu, Isidor, ĉu vi komprenas nun la signifon de la vorto boj-koto ? »

« Nun jes. Ĝi konsistas el du partoj : Boji kaj koto. »

**Renkontiĝas du hebreoj...**

— Bonan tagon. Kio nova ?
— Ne grava. Mi edziĝis, ricevis doton, malfermis magazenon...
— Tion vi nomas ne grava ? Kontraŭe, estas ja tre bone...
— Nu, bone, sed ne tre...
— Kial ?
— Kontraŭ mia magazeno loĝas barono, kiu amindumas kun mia edzino...
— Hm, malbone...
— Malbone, sed ne tre.
— ? ? ?
— La edzino de la barono, juna kaj belega virino, amindumas kun mi...
— Do, jen bone...
— Bone, sed ne tre...
— Nun mi jam ne komprenas. Kial malbone ?
— Ĉar mi al la barono liveras arianajn idojn kaj li al mi hebre-idojn.





— Vi aĉetis porkon, patro ! Sed vi ne havas porkejon.
— Ne grave, — ĝi loĝos kun ni.
— Jes, sed kio pri la odoro ?...
— Nu, — bestoj devas alkutimiĝi al ĉio.

**MISKOMPRENO**




*)

— Se vi volas resaniĝi, vi devos submetiĝi al severa dieto.
— Neeble, sinjoro Doktoro, mi estas ateisto !







« Via favorpeto estas malakceptita. Ĉu antaŭ ol morti vi havas unu deziron? »

« Jes, — mi tre dezirus ĝisvivi la triumfon de Esperanto! »

BREUILLE.

Kvin minutojn antaŭ finpreso de tiu ĉi numero ni ricevis la ĝojigan novaĵon, ke diverslandaj registaroj fine adoptis la sistemon de D-ro Privat. Iliaj delegitoj renkontiĝis dum intima kunveno kaj post interŝanĝo de l' ĉemizoj ili rapide likvidis la plej dornajn problemojn.




Se nia fidela kunlaboranto, Ludovic Rodo, kiu fotografis la scenon, ne trompas nin, ŝajnas, ke ĉeestis ankaŭ delegitino. Sed eble ni eraras.

« *Ĉefafero estas ridi. Ne gravas, je kies kostoj.* »

★

« *Popolo, kiu ne kuraĝas moki pri si mem, ne estas matura.* »

★

# Usonanoj planas Operacon Invado en Kanado



<u>*Ĵenja Amis, Libera Folio*</u>

***Ĉi-jare Ĵenja Amis verkis, komplice kun Garry Evans, la unuaprilan ŝercon por Libera Folio. Ni ne perdu la humursenton, malgraŭ ĉio, kaj ni kunridu, kanadanoj kaj usonanoj kune!***

Usonaj esperantistoj, inspirite de sia nova prezidanto, planas invadon de Kanado. La operaco laŭ informoj de Libera Folio okazos en julio ĉi-jare. La celo estas igi Esperantujon bonega denove, kaj grandigi la merkaton por La Kanada Verkaro.

Libera Folio eksciis el la plej konfidenca fonto pri la sekreta operaco, kiun usonanoj planas en Kanado. Por pli bone informiĝi pri tio, kio okazas inter la landoj, kiuj kunhavas la plej longan landlimon en la tuta mondo, Libera Folio faris siajn proprajn esplorojn kaj turnis sin al kelkaj aktivuloj de ambaŭ landoj por klarigoj.

– Jes! Ni absolute intencas la Operacon Invado. Ni fakte planas la aferon jam iom da tempo kaj ĝi,

absolute certe, okazos ĉi-julie, fiere konfirmis la cirkulantajn onidirojn Brendan Sawyers, la prezidanto de Usona Esperanto-Asocio.

Brendan, devena el la sudo de Usono kaj ne ema al malvarmo, diris ke la temperaturo estis gravega faktoro en la decido pri la dato:

– Vidu, ni ne volas kaptiĝi en la neĝo veturante, do ni decidis ke la sola taŭga tempo por invado estas somero. Kaj krome, ni ne havas spacon en niaj valizoj por neĝoŝoveliloj, jakoj, ĉapoj kaj varmaj ŝtrumpoj, ĉar ni devas alporti niajn gitarojn-banĝojn-ukulelojn por la arta vespero, librojn kaj diversajn varojn por la foiro.




Vendi De Bleury, la estro de la Propaganda Subkomitato de la Invada Komitato (PSIK), diris, ke la vendado de diversaj objektoj devus pagi grandan parton el la kostoj de la operaco.

– Ni aparte fieras pri la ĉi-jara aro de produktaĵoj kaj ni antaŭvidas ke la verda ĉapeto kun la vortoj ”Igu Esperantujon bonega denove” estos aparte bone vendata kaj ke…

Vendi De Bleury ne povis fini la komenton, ĉar ekestis du paralelaj debatoj: ĉu ”bonega” aŭ ”grandioza” kaj ĉu tiu vorto necesigas la akuzativon. S-ro De Bleury rekomendis ke la propaganda subkomitato dividiĝu je du subsubkomitatoj: unu pri la akuzativo (PSIK-n) kaj la alia pri la adjektivo (PSIK-a), kaj ke ambaŭ grupoj faru siajn rekomendojn en tempo sufiĉa por povi produkti ilin malmultekoste en Ĉinio.

La LIK (Loka Invada Komitato) konfirmis, ke la operaco okazos en Toronto, la plej granda urbo de Kanado:

– La tuta afero okazos apud la uson-kanada landlimo, kio faciligas la veturadon.

Unu LIK-ano proponis nomi la operacon ”TOI-ronto”, sed la propono tamen ne akceptiĝis. La temposkemo estas jam ellaborita: Inter la 5-a kaj la 11-a de julio 2025 okazos la granda surloka preparado al la invado – temos pri intensa surloka trejniĝo por pli bone kompreni la terenon kaj sukcesi en la komunikado.

La operaca trejnado estas konata sub la sekreta kodo ”NASK” — Neamika Subfosa Kampanjo. Post la sukcesa NASKo okazos, de la 11-a ĝis la 14-a de julio, la operaco mem. Oni antaŭvidas ke la kongresanoj unue invados la kongresejon kaj poste diversajn aliajn lokojn, kiel la famajn Niagarajn Akvofalojn.

LIK petas ke la invadantoj tamen sekvu la instrukciojn, iru al la busoj ĝustatempe kaj sekvu

la generalojn (rekoneblajn per la verd-flageta uniformo) kaj laŭeble ne perdiĝu, aparte ne ĉe Niagaro, kaj kontaktu la bazon, se tamen perdiĝo ne eviteblas.

Por kompreni, kiel kanadanoj vidas la tutan aferon, ni turnis nin al Garry Mann, la prezidanto de Esperanto-Asocio de Kanado. Verŝinte teon kun acersiropo en elegantan tason kaj ĝentile proponinte acersiropajn kuketojn, Garry diris konfidence:



**Garry Mann, la prezidanto de Esperanto-Asocio de Kanado, trinkas teon kun acera siropo.**

– Momente tio estas plena sekreto, sed tamen sciu, ke la tutan aferon elpensis kanadanoj.

Garry, profesia ekonomikisto, klarigas:

– Ni faris malnetan kalkulon kaj konstatis, ke por plene disvendi al kanadanoj La Kanadan Verkaron, presitan por la Montreala UK de 2022, ni bezonos proksimume 35–40 jarojn. Kaj ĉar ĉiu kanadano jam posedas almenaŭ unu ekzempleron de ĝi, ni bezonas venigi ”freŝan sangon” — homojn, kiuj ankoraŭ ne posedas tiun bonegan libron. Jen brila okazo disradiigi la kanadajn kulturon kaj literaturon al niaj najbaroj el Usono.

Dum Garry esperoplene demandis, ĉu la korespondanto de Libera Folio hazarde ankoraŭ ne posedas ekzempleron de tiu libro, en la salonon eniris lia edzino kaj demandis kun ioma grumblado, kiam finfine la skatolegoj de La Kanada Verkaro foriros el la kelo.

La sekretaj kaj strikte konfidencaj informoj pri la Operaco Invado (OI) haveblas ĉi tie: [OI sekrete kaj confidence]

*Komenca bildo: Jen kiel aspektis la pasinta usona invado de Kanado. La olea pentraĵo de John Trumbull prezentas la tragedian morton de la usona generalo Richard Montgomery en la Batalo de Kebekio la 31-an de decembro 1775, dum la Invado de Kebekio.*

# Kiam porko preskaŭ kondukis al MILITO

[Radio Verda](#)

**Ĉu vi iam aŭdis pri milito, kiu ekestis pro porko? Nu, vere okazis tia strangaĵo — kaj tio estis la "Porka Milito" en la insuloj San Juan, inter Usono kaj Brita Kanado, en 1859.**

Ĉio komenciĝis pro porko, kiu apartenis al brita loĝanto sur la insulo San Juan. La porko hazarde eniris ĝardenon de usona farmisto kaj manĝis liajn terpomojn. La farmisto, kolera pro la invado al sia ĝardeno, pafmortigis la beston. Kompreneble, la brita posedanto koleriĝis pri la morto de sia porko, kaj baldaŭ la eta konflikto fariĝis granda diplomatia problemo.


Akvarelo de bieno Belle Vue de insulo San Juan je la tempo de Porka Milito


Ambaŭ flankoj sendis trupojn al San Juan, kaj la malpaco kreskis rapide. Usonaj kaj britaj soldatoj alfrontis unu la alian, sed ambaŭ nacioj volis eviti sangoverŝon. Anstataŭ ol batali, ili decidis paceme kunloĝi sur la insulo dum pli ol dek jaroj. Tiel daŭris la situacio ĝis 1872, kiam internacia panelo de arbitracio, estrata de la germana imperiestro Vilhelmo la Unua, decidis doni la insulon al Usono. Ĉio finiĝis sen sangoverŝo — escepte kompreneble, por la malfeliĉa porko.

Sed jen interesa kaj nekutima postskribo al la historio: la vera fino de la porka milito okazis nur en 1959, cent jarojn post ĝia komenco. Delegacio de la insulo San Juan decidis proponi simbolan repaciĝon al la urbo Viktorio sur la kanada insulo Vankuvero, redonante porkon kiel simbolan anstataŭigon de tiu mortigita cent jarojn antaŭe. Ili planis buntan, historian ceremonion, kun kostumoj de tiu epoko.

La delegacio alvenis en la haveno de Sidney, sed

tie okazis neatenditaĵo. Tie ilin renkontis 19-jara doganisto kaj esperantisto, Wally du Temple, kiu laboris tie dum somera studenta posteno. Wally petis la necesan atestilon pri la sano de la porko — sed la delegacio ĝin ne havis! Rezulte, la junulo devis konfiski kaj enkarcerigi la porkon. La belan, simbolan ceremonion oni tamen faris, sed bedaŭrinde sen la porko mem. Semajnon poste, aŭtoritatuloj mortigis kaj forbruligis la porkon pro risko de infekto. Viktorio neniam ricevis sian promesitan porkoviandon.

Do, tiel finiĝis — iom tragedikomedie — la historio de la fama porka milito. La insuloj San Juan nun estas paca kaj bela loko, kie oni memoras ĉi tiun strangan okazaĵon amuze kaj amike.




**Blua linio: landlimo proponita de Usono**
**Ruĝa linio: landlimo proponita de Britio**
**Rozkolora linio: kompromisa landlimo**
**Nigra linio: nuntempa landlimo**




**Memorŝildo por Porka Milito.**

# Esperanto en Saskaĉevano

## *Bruce Arthur*

Laŭ la membrolisto de KEA, mi estas la sola membro en Saskaĉevano. Sed mi pensas, ke mi povas verki raporton.

Dum mia libera tempo, mi ofte legas Esperanton kaj mi korespondas kun homoj en aliaj landoj. Por reklami la lingvon, mi pendigis afiŝojn kaj skribis leterojn al iuj asocioj.




Andy Blair en Halifakso ankaŭ laboras por Esperanto en Saskaĉevano. Li organizas Kumzikojn (renkontiĝojn per Zoom) por la Prerioj. Mi estas dankema, kvankam mi ne ofte partoprenas. Andy sendis al mi ĉemizon kaj puloveron por reklami la Prerian Kumzikon (vidu la foton). Ĉi-jare mi ĝojas anonci, ke estis alia partoprenanto de Saskaĉevano. Tiu estas Kyle en Saskatuno (eĉ sed mi ne havas kontakt-informon).

Ankaŭ raportinda estas ke mi pagis dudek kvin dolarojn por aliĝi al *Saskatchewan Association of International Languages*. Sekve, Gord Zakreski, la direktoro de tiu asocio, petis paroli kun mi pri Esperanto. Li diris, ke lia asocio celas antaŭenigi lingvojn, inkluzive de Esperanto. Li diris, ke li povus helpi pli multe, se ni aliĝus kiel asocio. Mi diris, ke mi estas nur unu homo, sed li pensas, ke aliaj saskaĉevananoj volus lerni la lingvon, kaj li donis informojn pri kiel starigi asocion. Il ankaŭ ofertis aperigi artikolon pri Esperanto en la reta novaĵletero de la asocio, kaj li poste faris tion. Ĝis nun ne estas alia rezulto, sed eble estontece.

Alia interesa novaĵo estas ke mi povis renkonti esperantistajn vizitantojn dufoje en novembro 2024. La unua vizitanto estis Laetitia Bert (aŭ

Letisja, vidu sur la foto), kiu venis al Reĝino por partopreni simpozion pri komunuma sano, kion ŝi studas doktoriĝe en Kebekurbo. Sed ŝi estas de Francio kaj ŝi estas denaska esperantisto. Mi renkontis ŝin la trian de novembro kaj ni piediris por viziti la muzeon de natura historio kaj la provincan parlamentejon, kaj ni promenis laŭ la lago. Ŝi interesiĝis pri ĉio kaj mi ĝuis paroli kun ŝi.

La sekvan semajnon, la 11-an de novembro, mi renkontis la geedzojn Sherry Wells kaj David Yaki, kiuj estis veturantaj de Alberto al Detrojto. Ili multe interesiĝas pri propagandado por Esperanto kaj mi multe interesiĝis aŭdi kaj diskuti ilian ideojn. Mi bezonas ideojn ĉar nun mi estas la sola KEA-ano en Saskaĉevano.

**Regina home to smallest Esperanto language club in Canada**

Esperanto has attracted millions of speakers worldwide including 2 in Regina

Nichole Huck · CBC News · Posted: May 01, 2016 2:00 PM EDT | Last Updated: May 1, 2016



Bruce Arthur and Collin Carbno make up the entire Regina Esperanto Club. (Nichole Huck/CBC )

## Laborkomisiono Renato Corsetti:

### por konscio kaj daŭrigo de esperantista kunlaboro – kun informoj pri funebra ceremonio en Londono

En la 1-a de februaro 2025 frapis la tutmondan esperantistan komunumon la informo, ke forpasis Renato Corsetti (1941-2025). Aparte kortuŝe estis vidi el la pluraj reagoj, kiuj aperis interrete kaj en internaj interŝanĝoj, en kiom da kunlaboroj li estis enplektita. Renato ne estis nur unu el la honoraj prezidantoj de UEA, sed ankaŭ amiko de multaj, inter ili de pluraj simplaj membroj, kiuj al Renato estis la bazo de esencaj agadoj kaj atingoj en la Esperanto-movado.

Responde kaj honore al tio kreiĝas en la sino de UEA laborkomisiono Renato Corsetti, kies unua respondeco estas akcepti de homoj informojn pri tio, kion oni faris/estis farantaj kune kun Renato. Tiun komisionon gvidos Fernando Maia Jr., Vicprezidanto, kaj Michela Lipari, Komitatano de UEA. Laŭ tiu unua respondeco la komisiono havas kiel nunan ĉefan taskon organizi tiujn informojn por sekve studi la necesajn agojn kaj rimedojn por subteni la daŭrigon de la agadoj en kiuj Renato enplektiĝis.

**Pli da informoj en la [Gazetaraj Komunikoj de UEA]**

# Libroj, libroj sur la bretoj; kiom kostas la aĉetoj?

## *Bob Williamson, Sekretario de KEA*


Lastatempe okazis ĉarma rakonto pri feliĉa donaco de libroj al KEA-ano. Fru-marton 2025, Nicholas en Bowmanville (Ontario) devis malgrandigi sian libraron por povi loĝigi sian maljunan patrinon, kaj inter tiuj libroj estis dek tri esperantaj, kiujn antaŭ pli ol kvardek jaroj li aĉetis brokante en Toronto. Li neniam fariĝis esperantisto sed, anstataŭ ol forĵeti la librojn aŭ doni ilin al brokantejo, de kie ili eble malaperus en rubejon, li serĉis eblecon por transdoni ilin, kaj ofertis ilin al la Kanada Esperanto-Asocio (KEA). Li esperis, ke iu el ni povus uzi kaj ĝui ilin.



Ĵosefo feliĉe akceptas la librojn de Nicholas. (Jose Carrillo)

Kiel sekretario de KEA, mi tuj sendis la oferton al KEA-anoj sufiĉe proksimaj al Bowmanville, kaj plej rapide respondis Ĵosefo en Ajax. Post nur kelkaj tagoj, Ĵosefo veturis al Bowmanville kaj senkoste akiris la librojn. Nicholas diris al Ĵosefo, ke li neniam antaŭe renkontis esperantiston. Poste, KEA kore dankis al Nicholas pro lia bone pripensita kaj malavara donaco.

Tiu feliĉa afero memorigas al mi pri tikla demando por sufiĉe multaj el ni: kion fari pri niaj propraj esperantaj libroj post nia morto, aŭ post nia malkapablo uzi kaj ĝui ilin? Facilaj kaj bonaj solvoj malmultas. Ofte mankas al ni pli junaj familianoj kiuj volas heredi tiajn "restaĵojn el la pasinteco". Ofte ni havas librojn, kiuj jam troviĝas en nia Biblioteko, kaj nia bibliotekisto Marteno ne kapablas konservi multajn duoblaĵojn en sia loĝejo. Sufiĉa spaco mankas ankaŭ al publikaj




**Eble dua bildo: La libroj, kiujn donacis Nicholas. (Jose Carrillo)**

bibliotekoj, kiuj ofte hezitas akcepti multajn librojn, aparte tiujn por kiuj ekzistas malgranda neceso. Parenteze, klera taktiko tiurilate estas via mendado de esperantaj libroj el via propra biblioteko, eĉ se vi mem ne bezonas ilin.

Dum la ĉi-somera Dulanda Kongreso en Toronto, ebleco povus ekzisti por vendi, interŝanĝi, aŭ donaci viajn propran librojn al aliaj esperantistoj. Ŝanco gajni malgrandan profiton, aŭ eĉ fariĝi donacemulo kiel Nicholas, povus riĉigi vian sperton en Toronto.

# Kastelo Greziljono invitas

## La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:

**2025-jun-30/jul-10:** Maratona Esperanto-kurso kun 3 instruistoj, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia E-Konferenco: gresillon.org/m

**2025-aŭg-24/29:** Verda Naturisma Semajno kun Esperanto-kursoj: gresillon.org/n

**2025-okt-24/nov-02:** AŬTUNAS, kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle: gresillon.org/au

**Sekvaj eventoj:** gresillon.org/a

**Kontakto**: kastelo@gresillon.org



# Petveture tra Eŭropo

*Gabin Forcier*

Bonan tageron! Mia nomo estas Gabin. Mi estas 25-jaraĝa esperantisto el Francio kaj aktivulo de JEFO kaj TEJO.

Antaŭ du jaroj kaj duono mi decidis lerni Esperanton por entrepeni grandan aventuron: petveturi tra Eŭropo kaj gastiĝi ĉe esperantistoj per Pasporta Servo, samtempe pliprofundigante miajn konojn pri la lingvo kaj la Movado.


Dum mia vojaĝo, kiu finfine daŭris pli ol ses monatojn, mi trairis 20 landojn, ĉeestis kvin eventojn kaj pasigis 85 noktojn ĉe esperantistoj. Ĉiun paŝon de mia vojaĝo mi dokumentis per filmetoj. Nun disponeblas longa dokumentfilmo pri mia sperto: [youtu.be/6m3Ffodblyk](https://youtu.be/6m3Ffodblyk)

La celo de mia dokumentfilmo estas pruvi, ke Esperanto funkcias kiel internacia lingvo kaj ke ĝi ofertas al junuloj kiel mi fenestron al la mondo, pere de kiu oni povas vojaĝi, interkompreniĝi kaj amuziĝi. La dokumentfilmo reprezentas mian personan dankmesaĝon al esperantistoj, kiuj subtenis min dum la vojaĝo, tamen, ĝi celas motivigi ne-esperantistojn lerni Esperanton kaj konatiĝi kun la Movado. Por ke ne-esperantistoj povu ĝui la filmon, jam disponeblas subtekstoj en 10 lingvoj!

Mi estus ege dankema, se vi povus helpi tiun ĉi projekton per spektado kaj ĉefe per disvastigado al viaj asocianoj kaj lernantoj. Mi ankaŭ disponeblas por prezenti la dokumentfilmon dum viaj eventoj (ĉeeste en Eŭropo kaj rete en aliaj kontinentoj).

Koran dankon kaj ĝis baldaŭ en Esperantujo!

Salutojn el Nanto,
Gabin



# Vojaĝoj kaj Rotario: per Esperanto, por Esperanto!

*David Yaki kaj Sherry Wells, esperantosherry@tm.net*

**Ni, David Yaki kaj Sherry Wells, havas tri vojaĝajn celojn: 1) renkonti esperantistojn kaj tranokti per Pasporta Servo; 2) prezenti Esperanton al niaj ne-Esperantaj gastigantoj kaj 3) prelegi en Vinipego, Manitobo, pri la unua el pli ol cent Rotariaj Amikaroj — la Rotaria Amikaro de Esperanto (RADE) fondita en 1928.**

## Kanadaj esperantistoj

En Reĝino, Saskaĉevano, ni renkontis lokan esperantiston, Bruce Arthur. Li estas izolita, sed li verkas ĉiumonatan novaĵleteron. Li kunvenas kun Andy Blair (de Halifakso) per Zoom kaj invitas aliajn. Ne estis alia esperantisto kun ni, sed ni komencis konversaciojn pri Esperanto kun aliaj personoj en la halo de la butikaro.



Surprize, unu estis virino, kiu antaŭe kunlaboris kun Bruce, sed ne sciis pri Esperanto. Juna virino dum nia konversacio informis nin, ke ŝi lernas la indiĝenan lingvon, la Krian. Hazarde, indiĝena amiko de David, kiu bone parolas la Krian, telefonis en tiu sama momento. David enmanigis la telefonon al la virino por doni al ŝi la okazon paroli Krie kun lia amiko.

En Brandon, Manitobo, ni renkontis novan esperantiston, Markus. Li studis Esperanton dum 500 tagoj per Duolingo sed ankoraŭ ne parolis ĝin al iu ajn. Lia konversacia kapablo kaj scio pri Esperanto imponis nin, kaj plaĉis al ni ambaŭ doni al li la okazon paroli nian lingvon. La sukceso de nia tempo kune montriĝis, kiam li partoprenis en la sekva Zoom-kunveno de Albertaj esperantistoj.

En Vinipego ni renkontis Jan-on


Lakuse kaj Rajmondon, kiuj konis unu la alian per la reto sed ne persone ĝis tiam. Ni donis tiun okazon renkontiĝi. Jan interesiĝas pri Tokipono. Ŝi tradukis en Esperanton la belan poemon "Kiam mi havas timojn" (de John Keats) kaj ili ambaŭ lernis Esperanton.

## Pasporta Servo

Plejparte, Pasportoservaj gastigantoj estas ĉe la okcidenta aŭ orienta flankoj de Kanado. Do, Pasporta Servo helpis nin nur en Usono dum du vojaĝoj.

En St. Paul, Minesoto, ni tranoktis kun Joan Philips kaj ŝia edzo. Ni partoprenis la kutiman kunvenon kun Joan, Doug Duea, Richard Larson kaj Arturo Johnson.

Kelkaj noktoj poste ni denove tranoktis per Pasporta Servo, jam la duan fojon, en la domo de







Randi Ream kaj Karlos, kaj iliaj tri hundetoj. Estis plezuro vidi ilin denove.

Dum 2023 kaj 2024 ni tranoktis du fojojn kun Theresa McGarry en Tenesio, Peggy kaj Ted Dolter en Sankta Luiso kaj Alex (Alekso) Miller en Atlanto. En la domo de Alekso ni renkontis ankaŭ Sasha-n, Brandonon kaj Luther-on, kaj vidis kaj ĝuis provversion de video, kiun Sasha filmis por la Usona Bona Film-Festivalo. Ni vidis ĝin poste kaj notis, ke li faris etajn, sed bonajn ŝanĝojn por plibonigi ĝin.

Dum tiu vojaĝo ni konstatis, ke, bedaŭrinde, Pasporta Servo malkreskis. Antaŭ multaj jaroj ni estis gastigantoj kaj tiam ĝi havis pli da aliaj gastigantoj. Multaj personoj ne plu povas gastigi. Estus bonege kaj estas grave, ke ĝi rekresku.

## Aliaj gastigantoj

Ni tranoktis ankaŭ per *SERVAS* kaj *Couchsurfing*,

# Pasporta Servo

tranoktadaj kaj amikecaj organizoj. *Couchsurfing* signifas esti dormanto sur sofo.

SERVAS estis fondita de esperantisto kaj celas esti reto por tutmonda paco kaj amikeco. La fondinto – Bob Luitweiler – lernis kaj poste instruis Esperanton kiam li estis en malliberejo en Usono kiel Konscienca Kontraŭulo dum la Dua Mondmilito. "Servas" estas Esperanta vorto. Ĝi ankaŭ havas la alian Esperantan vorton: Amiko – t.e., statuso, kiun oni havas antaŭ ol oni fariĝas membro.

SERVAS-membroj gastigis nin en Edmontono dum kvar noktoj, kiam David pretigis nian domon, kaj dum du noktoj en Vinipego, kie ni prelegis antaŭ la Rotaria Klubo. Neniu el ili sciis pri la fonda historio de SERVAS kaj eĉ ne tion, de kie venas la nomo. Ni prezentis ĝin! Tamen, la edzo en Edmontono kolektis poŝtmarkojn kaj havis poŝtkarton skribitan en Esperanto kun la dato 1952. David tradukis ĝin por li.

Ni estis gastigitaj per *Couchsurfing* en Leksingtono, Kentukio, en oktobro, kaj en Reĝino, Saskaĉevano, en novembro. Niaj gastigantoj ambaŭ neniam sciis pri Esperanto, sed kompreneble, ili scias iom pri ĝi nun!

Kien ajn ni iris, David kunportis avokadojn kaj kuiris avengrion por ĉiuj. Kelkfoje ni invitis niajn gastigantojn por restoracia manĝo. Ni plejparte kunportis niajn proprajn litotukojn, kelkfoje ankaŭ dormosakojn. Mi ĉiam flankenmetis la bantukojn kaj litotukojn de niaj gastigantoj, kiujn ni uzis, por iom malgrandigi la laboron de niaj gastigantoj.

Membroj de tiuj organizoj regalis nin, kaj ni sentas, ke ni havas novajn amikojn. Mi membriĝis en *Couchsurfing* dum la somero; mi ĝuis mian gaston kaj atendas aliajn gastojn en la estonteco. Ni rekomendas, ke esperantistoj uzu tiujn organizojn – oni estu kaj gastoj dum siaj vojaĝoj, kaj mem gastigu aliajn homojn en siaj domoj. Kompreneble, ni ĉiam parolu pri Esperanto ĉie, kien ni iras!

## Rotaria prelego

Rotario fondiĝis en Ĉikago en 1905, kun komercaj kaj amikecaj celoj. Ĝia slogano estas "Servo super si". Rotario rapide kreskis. En 1910 en Detrojto fondiĝis ĝia 16-a klubo. Tiel okazis, ke komercisto el Vinipego ĉeestis konferencon en Detrojto kaj vizitis la klubon, kaj tio kuraĝigis lin fondi klubon ankaŭ en Vinipego. Tiel Rotario fariĝis internacia organizo en aprilo 1912. Poste, en 1916, li ankaŭ fondis klubon en Edmontono, Alberto.

David Yaki, de Edmontono, kaj Sherry Wells, antaŭa membro de Rotario en Detrojto, prelegis en Vinipego, Manitobo, pri la unua Rotaria Amikaro – la Rotaria Amikaro de Esperanto (RADE) fondita en 1928. (Intertempe, Rotario jam fariĝis interkontinenta en aŭgusto 1912 per la fondo de klubo en Londono, Britio.)

La Amikaroj estas internaciaj grupoj de rotarianoj, kiuj ĝuas komunajn interesojn. Nun estas 109 Amikaroj. Jare, en la Halo de Amikareco, ĉe ĉiu Rotaria Internacia Kongreso, estas standoj de diversaj Amikaroj. RADE plej ofte havis standojn. Sherry laboris ĉe la RADE-stando en 2011 en Novorleano.




La slogano de RADE estas: Rotaria Amikaro uzante justan internacian lingvon. Rotario oficialigis 12 lingvojn ĝis nun en sia uzo, sed ne Esperanton, malgraŭ tio, ke Esperanto estis la lingvo de la unua Amikaro. Bedaŭrinde, estas ne nur maljusteco de tiu politiko, sed ankaŭ malŝparo de mono por tradukado kaj presado, kiu povus esti uzata por la mirindaj celoj de Rotario.

En Vinipego 21 membroj aŭdis la prelegon de David kaj Sherry pri Esperanto. Malpli ol duono el ili antaŭe aŭdis pri Esperanto. David kaj Sherry jam prelegis ĉe du aliaj kluboj kaj planas multajn aliajn prelegojn en la venontaj monatoj.

Sherry realiĝis al Rotario Internacia, ĉi-foje per la Rotaria Klubo de Esperanto, Brazilo (Rotary Club de Esperanto, Brasil). Ĝia alia esperantista membro estas Wally Du Temple (Brita Kolumbio, Kanado).

David kaj Sherry estas aparte ekscititaj, ĉar la Rotaria Kongreso okazos ĉi-jare en Kalgario (Alberto) en junio 2025. Ili planas esti ĉe la RADE-stando tiam.

Rotario Internacia diras: “Ni ne timu revi grande kaj aspiri je aŭdacaj celoj”. Tio estas ankaŭ la vero por David kaj Sherry kaj RADE por Rotario Internacia.

**Pli da informoj:** rotaryclubdeesperantobrasil.org kaj RADE: rade.fontoj.net

# Libera Folio: “Ĉu AI riĉigas la Esperantan kulturon?”

***Artefarita intelekto helpas riĉigi la Esperanto-kulturon. Tion opinias Georg Jähnig, kiu uzis AI-ilon por muzikigi poemojn de Zamenhof. Sed ĉu muzikaĵoj kreitaj tiel vere apartenas al la Esperanto-kulturo?***

**Ĵus aperis en la reto Ludovika Poezio – muzikalbumo kreita per artefarita intelekto fare de Georg Jähnig, germana esperantisto loĝanta en Prago. Laŭ li temas pri la unua muzikalbumo en Esperanto, kiu estas kreita per AI.**

La albumo estas la unua ero en la projekto Nova Tonaro, de Georg Jähnig. Ĝi tamen ne estas la unua muzika projekto en Esperanto produktita per AI – pliaj eksperimentaj verkoj de alia aŭtoro troveblas ĉe Bitoj kaj Dopamino.

La nova albumo enhavas dek kantojn en tre diversa stilo, de roko kaj diskoteka muziko ĝis ĵazo kaj balado. La tekstoj de la kantoj baziĝas sur poemoj de Zamenhof. Aperas interalie funka versio de *Ho mia kor’*, ĵaza versio de *Al la fratoj* kaj energia tekno-versio de *En sonĝo princinon mi vidis*.

La albumo estas ”senpage disponebla en streaming- [elsendfluaj] servoj kiel Spotify, Apple Music kaj YouTube ktp, por ke ĉiuj povu sperti la eksperimentan kombinaĵon de Zamenhofa poezio kaj modernaj muzikaj ĝenroj”, Georg Jähnig skribas en gazetara komuniko.

***Libera Folio:* Ĉu vi volus rakonti, kun kiu celo vi kreis la muzikaĵojn, kaj ĉu vi kredas, ke esperantistoj volos aŭskulti muzikaĵojn kreitajn per AI?**

– Certe. Mi eltrovis la ilon Suno antaŭ unu jaro kaj tuj ŝategis kiel facile oni povas krei sufiĉe altnivelan muzikon. Kaj komencis krei mallongajn kantojn por amikoj, kiujn ankaŭ ili ŝatis.

– Intertempe, la kvalito de Suno ege kreskis, kaj mi kredis, ke tia muziko povas plaĉi eĉ pli al multe da homoj. Ĉefe inter parolantoj de relative malgrandaj lingvoj, la homforto estas nevasta, do ankoraŭ ne ekzistas tiom da specifaj Esperantaj muzikaĵoj, ekzemple en funko, triphopo aŭ etosmuziko, laŭ mia scio. AI tie povas facile helpi kreskigi la proponadon kaj tiel riĉigi la Esperanto-kulturon.

**Sed ĉu produktoj kreitaj per AI vere estas**

**Esperanto-kulturo?**


– Kial ili ne estu?

**Nu, la demando estas ĉu produktoj kreitaj per AI entute estas kulturo, aŭ io tute alia.**

– Mi kredas ke plej gravas la rezulto: ĉu eblas ĝui, aŭskulti AI-kreitan muzikon aŭ danci al ĝi? Certe jes. Ĉu AI-kreinto povas verki sian propran tekston kaj nur uzi AI por krei nur la muzikon? Ankaŭ jes. Imagu kiom da esperantistoj eble tute ne konis la poezion de Zamenhof kaj nun povos eltrovi ĝin.

– Laŭ mi tio estas iom la sama debato kiel kiam aperis elektronikaj muzikiloj. Kaj la demando iom similas al ”Ĉu Esperanto entute estas lingvo, aŭ io tute alia?”

**Libera Folio, marto 2025**




## SAT-kongreso en majo 2025

La 77-a kongreso de SAT Amikaro okazos de la 23-a ĝis la 27-a de majo 2025 en Vigy (57) inter lorenaj urboj Metz kaj Thionville proksime de tri landlimoj.

La restadcentro ADEPPA, kie ni loĝos, estas bone ekipita por kongresi. Jam la kongresanoj aprezis ĝin kiam nia asocio Esperanto-Thionville organizis la 57-an kongreson de SAT Amikaro en 2002 pro la kvieto kaj la verda naturo, kiu ĉirkaŭas ĝin. Tie la ekosistemo estas tre riĉa!

Ni proponas al vi: viziton, libroservon, laborsesiojn, kursojn, prelegojn, ekzamenojn de F.E.I.

Informojn kaj kongresaliĝilon vi trovos en La Sago, la retejo de SAT-Amikaro sat-amikaro.org kaj en la retpaĝo: eventaservo.org/e/b38009

retadreso : esperantothionville@laposte.net

PS: paralele ni organizas kun komuna kultura programo la 89-an staĝon de la Orienta Federacio *Espéranto-France Est*.

SAT-Amikaro

# Ne inundu Esperantujon per AI-kreaĵoj!

## *Jordan Zero*

Se lastatempe oni travadis esperantajn akvojn, sendube oni rimarkis la novan fluon de novaj kreaĵoj de kreemaj esperantistoj. Ŝajne ne nur la kvanto da esperantistoj kreskis, sed ankaŭ ilia aktiveco. Bedaŭrinde, tio estas nur miraĝo. La viva Esperanta ondo, sur kiu oni pensis ke oni estas flosanta, fakte estas senviva seka dezerto. Aperis granda nombro da esperantaj kreaĵoj generitaj per Artefarita Intelekto (AI). Malgraŭ la bonaj intencoj de la generintoj, tiaj AI -kreaĵoj malhelpos la Esperantan komunumon. AI-kreaĵoj estas trudherboj, kiujn esperantistoj akvumas, senintence pereigante la homan Esperantan kulturon.




**Simbola ilustraĵo de AI generita de AI, Midjourney, la 5an de februaro 2023**

Jam malĝuste kredas malkleraj neesperantistoj, ke *neniu* parolas Esperanton, aŭ ke ĝi estas mort(int/ant)a lingvo. Se neesperantisto hazarde enirus Esperantujon, kaj estus inundita de AI-kreaĵoj, kompare al homfaritaj kreaĵoj, tiu malvera kredo nur plifortiĝus. La malfacileco de la esperantista defio konvinki iun lerni la lingvon multobliĝus, se la esperantistaro eĉ ne mem uzus la lingvon.

Plejofte homoj lernas lingvojn pro kialoj raciaj, kiel pro laboro, mono aŭ vojaĝo; sed estas ankaŭ aliaj kialoj, kiel komuniki kun alilandanoj, ĝui lingvolernadon aŭ plene asimili novajn kreaĵojn kaj kulturon. Neniu pensus, ke estas io komunikinda, se la rivero Esperantuja estus tiom poluita per AI-kreaĵoj. Neniu taksus la lingvon ĝuebla, se la esperantistaro mem ne emus naĝi en la lingvo.

Elpensi kialon sorbi specifan lingvon, speciale por lingvemuloj, kutime facilas. Kial la italan? Legi Dante-n. La latinan? Studi antikvan okcidentan




**AI-generaĵoj aperas en la spektosugestoj por komencantoj de UEA (UEA Facila)**

historion. La korean? Aŭskulti la popularan korean muzikon. Bani sin en fremdlingva kulturo sen lingvoscio eblas, sed ofte homoj volonte plonĝas en la lingvan lagon profunde pro la kulturaĵoj.

Kio allogos iun al la lago Esperanta? La respondo povus esti aŭ legi Auld-on, aŭ lerni historion pri artefaritaj lingvoj, aŭ eĉ paroli la plej popularan pontlingvon en la mondo. Sed Auld eble ne travivos la AI-tempeston. Oni ne povos ĉerpi liajn verkojn el la malpura akvo post granda enverŝo de AI-kreaĵoj. Iu, malkovrinte Esperanton, ne taksus la lingvon kapabla por esprimi pensojn profundajn, nek konjektus, ke ekzistas riĉa historio de Esperanto, nek aŭdace dirus, ke la lingvo estas tiel sukcesa ke ĝi vivas pli ol cent jarojn post la morto de sia kreinto. Oni ne plu povus trovi la valoraĵojn el la salakve koroditaj ruinoj de la lingvo, pelitaj al la marfundo de nia lingvo post AI-inundo.

Grandaj teĥnologiaj firmaoj, kiuj senbride elverŝis generantan artefaritan intelekton en la mondon, ofte ignoras la etikan dimension de kopirajtoj, ekspluatante la intelektajn proprietaĵojn de aliaj sen permeso de la originalaj posedantoj. Kvankam aliaj grandaj organizaĵoj havas la rimedojn kontraŭbatali la persekuton de tiuj teĥnologiaj firmaoj, ŝatokupuloj sendependaj kaj malriĉaj ne havas tiajn rimedojn. Bedaŭrinde, tio nur

emfazos, ke la nuna kopirajtleĝaro ekzistas nur por tiuj, kiuj povas pagi por aplikigi tiujn leĝojn. Se la esperantistaro celas atingi leĝegalecon, subteni kaj uzi AI-sistemojn por krei esperantaĵojn ne estu akceptebla.

Parto de la valoro de arto estas, ke ĝi estas de homo. Por homo, la rilato al kreinto estas tiel grava, kiel rilato al kreaĵo. Kompreno de la kreinto kaj de ties intenco estas parto de la plena kompreno de la kreaĵo mem. Ĉe AI-kreaĵoj mankas tiu grava dimensio. Manko de tiu aspekto estas des malpli pardoninda, ke nia lingvo celas ebligi homan interkomprenon.

Pasis pli ol du jaroj ekde la publika eldono de *Chat-GPT* sed oni ne povas sincere diri, ke ĝi kreis valorajn kreaĵojn. Ne videblas, almenaŭ ĝis nun, kreaĵo, pri kiu oni povus diri: "Tia AI-kreaĵo estas bona. Neniel homo povus elpensi tion". AI-kreaĵoj nur spegulas tion, kion la homaro jam kreis. Kiel Narciso, rigardante sin en la spegulo de la rivero, ĉu ankaŭ ni estas tiel enamiĝintaj al niaj jam ekzistantaj kreaĵoj, ke ni dronos nin en Esperantaj regurgitaĵoj?

Malgraŭ la granda kvanto da generataj kreaĵoj, kiuj estis kreitaj ĉiutage dum la pasintaj du jaroj, dum kiuj tiuj sistemoj estis facile uzeblaj, ne aperis kreaĵo kun kiu indas interagi iom da tempo post la momento de ĝia kreado. AI-kreaĵo estas kiel maĉgumo; ĝi komence bongustas, sed rapide forĵetindas. Kio estos la artaĵo, kiu instigos homojn enprofundiĝi en Esperanton? Evidente, ne io el AI.

Alia problemo pri la uzo de AI-sistemoj estas iliaj teraj efikoj. Ni ankoraŭ ne plene komprenas kian damaĝon ni faras per AI. Tiaj sistemoj postulas multe da akvo kaj energio. Ni jam scias, ke la nura konstruado de komputiloj kostas al la tero multe. La teraj efikoj, kiujn kaŭzos AI-sistemoj, malegale suferigos homojn tra la tuta mondo, ĉar la severeco de sufero pro klimatŝanĝo dependas de tio, kie oni loĝas. Do ekzistos mondo, kie homoj, kiuj uzas tiajn sistemojn ofte, ne suferos la efikojn de ilia uzo, sed en aliaj partoj de la mondo estos homoj, kiuj ne multe uzas ilin, sed kiuj tamen multe suferos pro la efikoj de klimatŝanĝo kaŭzitaj per AI. Se Esperanto estas justa lingvo, la verda lingvo estu verda.

Ni estas ŝipanoj de nia kara lingvo. Jam venis tempo, en kiu ni decidos, ĉu stiri en malhoman uraganon aŭ veli for per flugiloj de homa vento.



bildo: freepik.com

# Buchanan-tago en la universitato Liverpolo

## *Geoffrey Greatrex*

En merkredo, 5-an de marto, okazis Esperanto-tago en nordokcidenta Anglio. Ĝin organizis Geoffrey Greatrex, kiu pasigas esploran duonjaron ĉe la universitato Kembriĝo, kaj jam dum pluraj jaroj helpas administri la fonduson Buchanan, kiun disponas la universitato por Esperanto. Antaŭ jaroj eĉ ekzistis posteno de lekciisto pri Esperanto en la departemento pri modernaj lingvoj; nun restas malpli da rimedoj, sed ili sufiĉas por organizi almenaŭ iujn eventojn. Pli da informoj pri D-ro John Buchanan, kiu, antaŭ preskaŭ jarcento, testamentis grandan sumon al la universitato, oni povas legi en libro de D-ro Angela Tellier, *Dr John Buchanan – an Esperanto legacy to the University of Liverpool* (Barlastono, 2013). Ŝi daŭre okupiĝas pri la restantaj sumoj, same kiel Geoffrey Greatrex kaj D-ro Damien Hall de la universitato Novkastelo (Anglio). Por ĉi tiu evento ludis ankaŭ gravan rolon D-ro Jessica Hampton, kiu doktoriĝis en la universitato pri temo ligita al Esperanto kaj kiu subvenciiĝis de la Buchanan-fonduso. Bonŝance ŝi lastatempe revenis al la urbo kaj tiel povis facile intertrakti kun la membroj de la departemento kaj aliaj administrantoj.




Estas rimarkinde, kiom da esploroj okazas nuntempe pri la historio de esperantistoj – ne tiom por bildigi la Esperanto-movadon, kio evidente estas interesa temo, sed pli por lumigi mondan historion kaj la rolon de ordinaruloj en (ekz.) la frua 20a jarcento. Pascal Dubourg Glatigny en Parizo aparte aktivas en ĉi tiu tereno:

forte rekomendindas la nova retejo peraire.huma-num.fr/eo pri la vojaĝoj biciklaj de anarkisto Lucien Péraire en la frua 20a jarcento, kiuj baziĝas sur lia taglibro de rimarkinda vojaĝo. Same vizitindas la paĝaro mondmilito.hypotheses.org/, kie kolektiĝas plurspecaj rakontoj pri la mondaj militoj, ĉiuj en Esperanto. Mankas spaco ĉi tie por aludi ĉiujn esplorojn tiajn, sed oni ankaŭ menciu la esplorojn de Xavi Alcalde, kiu multe studis la historion de Katalunio en la sama periodo.



En Britio same viglas tiaj esploroj, kiel eblis malkovri dum la unutaga aranĝo. Unue prelegis doktoriĝanta studento, Bipasha Bhattacharyya (kolegio Trinity, Kembriĝo), kiu traktis la rolon de Esperanto en suda Azio ĝis la mezo de la 20-a jarcento; sekvis ŝin Bernhard Struck (universitato St. Andrews), kiu reliefigis la multajn virinojn en la frua movado – kiujn oni rimarkas, ekz., en grupaj foto de kongresoj aŭ lokaj kluboj, sed kies nomoj ne nepre troviĝas en listoj de kongresanoj aŭ klubanoj. Li aludis la pli vastajn sociajn ŝanĝojn dum la periodo kaj kontrastis la mondon priskribitan de la romano *Marta* de Eliza Orzeszko (kiu unue eldoniĝis pole en 1873, kaj kiun tradukis Zamenhof) kun tiu de la komenco de la 20-a jarcento, kiam multiĝis karierebleco por virinoj.

Sed la tuta tago ne dediĉiĝis al historiaj esploroj, ĉar James Hawkey (universitato Bristolo) lerte kaj distre parolis "Pri la studado de socilingvistika variado en Esperanto"; li prelegis ĉefe en Esperanto kun bildoj en la angla, dum la aliaj prelegantoj faris inverse. Michele Gazzola (universitato Ulster) ne nur prezentis la revuon *Language Problems and Language Planning*, sed ankaŭ post la tagmanĝo parolis pri sia esplorfako pri lingva justeco: kiel eblas mezuri kaj taksi justecon en ĉi tiu kampo, ekz. en la jura sistemo de lando. Konkludis la tagon stimula prelego de Ian Rapley (universitato

Kardifo) pri la japana movado kaj internacia korespondado en la frua 20-a jarcento.

Partoprenis la eventon ne nur la prelegantoj, sed ankaŭ anoj de la liverpola grupo kaj aliaj samideanoj, kiuj venis de pli fore, ekz. la verkisto Geoffrey Sutton kaj la instruisto Malcolm Jones; Maŭrizio Giacometti venis de apud Oksfordo por instrui la lingvon al eventualaj komencantoj, sed bedaŭrinde neniuj sin prezentis. Ankaŭ la ĝenerala direktoro de la brita asocio (EAB), Tim Owen, vojaĝis al Liverpolo por aŭskulti la prelegojn.

Resume, la prelegoj kaj la diskutoj kaj demandoj evidentigis kiom viglas studoj pri Esperanto en Britio hodiaŭ. Tia esplorado estas nur parto de pli vasta fenomeno, tamen, kaj oni ne povas dubi ke, ekzemple, la kanada laboro pri la taglibroj de Henri Ellenberger, en kiu aktivas pluraj samideanoj ĉi tie, ankaŭ antaŭenigos tiajn studojn. Kiel oni substrekis dum la diskutoj, sendube kuŝas en mansardoj, skatoloj k.s. multaj interesaj dokumentoj, kiujn deziras studi kaj esplori fakuloj tra la mondo. Do ni ĉiuj zorgu, ke oni ne forĵetu korespondaĵojn kaj aliajn aferojn, kiuj fariĝos utilaj atestaĵoj en la estonteco!

## Reklamu vian klubon kaj Esperanton

Helpo disponeblas al lokaj kluboj, kaj materiala helpo (ekz., broŝuroj, afiŝoj, flagoj, retreklamado ktp.) kaj nemateriala (ekz., projekta helpo, planado, informado, dezajnado, konsilado). Kontaktu Andy Blair ĉe ahblair@yahoo.com por komenci (aŭ vigligi) vian E-klubon aŭ por antaŭenigi Esperanton en via komunumo.

## Bezonata: E-retprogramisto

Estas serĉata programisto kapabla krei skriptojn por Google Chrome. Ĉi tio estas por Esperanto-rilata projekto por la Dulanda Kongreso, por ebligi vendadon de libroj per kunsubskribo, modifante ekzistantan komercan POS-sistemon, kiu uzas retumilon Chrome. Malgranda projekto kun granda efiko: tio ebligos partoprenantojn en estontaj kongresoj alporti siajn uzitajn E-librojn (kaj aliajn objektojn) por vendi kaj profiti. Tio ankaŭ ebligos veran Bazaron dum kongresoj, kiu helpos pagi por la kongresoj. Kontrakta salajro: $40 hore. Kontaktu Andy Blair ĉe ahblair@yahoo.com.

# La morto de mia patrino

## *Bob Williamson*

Mi hezitas aperigi ĉi tiun artikolon pro la malfeliĉa temo kaj pro tio, ke ŝajne temas pri tre malprobabla okazaĵo. Tamen, laŭ mi gravas informi al la publiko, ke tia afero ja povus okazi al via familio, ĉar ĝi jam okazis al la mia.

Dum iliaj lastaj jaroj, miaj maljunaj gepatroj esploris la eblecon translokiĝi de sia propra domo al maljunulejo, kie oni povus helpi al ili vivi komforte kaj sekure. Tamen, eĉ kiam oni ofertis lokon, ili neis; ili preferis resti en la propra domo. Anstataŭe ili pagis komercan firmaon (*Home Instead*, halifaksa filio), kiu helpadis al ili per fojaj purigado, preparoj de manĝoj, sekureco kaj akompano en ilia propra domo. Ili ricevis adekvatan kaj foje tre bonan servadon, depende de la laboristo. Finfine, dum tri semajnoj mia paĉjo kuŝis mortanta en hospitala lito en la hejma salono, kaj tiam ni plilongigis la servon de la firmao al tuttaga, kutime ofertita en 12-horaj deĵoroj. Post kiam paĉjo mortis en sia propra domo, dum mi ĉeestis, panjo certe bezonis tuttagan prizorgon, kaj tion ni daŭrigis. Malgraŭ ŝia hezito, ni ankaŭ serĉis longdaŭran prizorgan instalaĵon. Tamen unu nokton, sep semajnojn post la morto de paĉjo, la dumnokta laboristo sentis sin malsana kaj decidis forlasi panjon sen voki la firmaon por anstataŭulo, kiel ŝi devis. Kiu scias, ĉu ŝi planis reveni antaŭ la deĵorŝanĝiĝo. La fal-detekta servo atentigis min, ke panjo falis (penante sen helpo uzi la komodon en sia dormoĉambro), kaj post duonhoro ŝi mortis, akompanata de siaj najbaroj kaj ĵus antaŭ ol mi alvenis. Bedaŭrinde oni instigis al mi fari kardiorevivigon, sed tio ne sukcesis. Ŝi havis 95 jarojn.

La firmao tuj maldungis la laboriston kaj pardonis la lastan duonmonatan fakturon, sed ili vere neniam akceptis respondecon. Ni ankaŭ ne scias, ĉu tiu ĉi laboristo trovis similan laboron aliloke. Vi devas konscii, ke ne ĉiu profitcela hejma prizorga firmao aŭ laboristo estas centprocente fidinda, malgraŭ la trankviligaj televidaj reklamoj. Ili estas reguligitaj ne de la provinca sanserva departemento, sed de komercaj regularoj. Ni kredas, ke forlaso de protektenda maljunulo devus fariĝi krima delikto, sed nuntempe ĝi ne estas.

# Pavlo Viŝebaba

Pavlo Viŝebaba (nask. 1986) estas konata ukraina verkisto, muzikisto kaj soldato, premiito de pluraj literaturaj konkursoj. Li naskiĝis en Kramatorsko (Donecka regiono). Komence li studis inĝenieradon en Donecko, sed poste transiris al ĵurnalismo en Mariupola ŝtata universitato. Fininte la universitaton kun honoro (2012), Pavlo Viŝebaba eklaboris en Kijivo. Li partoprenis aktive la Revolucion de Digno*. En 2014 li rezignis pri la uzo de la rusa lingvo, transirinte al la uzo de la ukraina lingvo. Li klarigis tiun agon kiel reago por protesti la okupon de Kramatorsko de "solduloj de la Rusa Federacio kaj ĝiaj kunlaborantoj…" Post la komenco de la plenskala invado de Ukrainio (februaro 2022) li eniris en la Ukrainan Armeon (68-a aparta ĉasbrigado), kiel estro de la komunika branĉo de la kampo-komunika unuo.



Lia poemaro "Nur ne skribu al mi pri la milito" (2022) estis represita dufoje en tiu jaro. La unua eldono (preskvanto 15 000 ekz.) estis elĉerpita en 15 tagoj en decembro 2022. La dua ĝisdatigita eldono de la kolekto estis publikigita en februaro 2023. La poemon "Al mia filino" li verkis en majo 2022. Ĝi estas respondo al la letero de lia filino, kiu estis evakuita eksterlanden pro la milito. En tiu letero ŝi demandis, pri kio ŝi rakontu al li en siaj leteroj. La poemo estas tradukita al 15 lingvoj, kaj nun al Esperanto. La poemo "Al mia filino" kaj la novelo "Marsanoj" estis inkluzivitaj la Instruplanon pri la ukraina literaturo por mezlernejoj (2024). Pavlo Viŝebaba verkis ankaŭ la poezian libron "Mia generacio".

** Revolucio de Digno, ankaŭ konata kiel Majdana Revolucio aŭ Ukraina Revolucio, okazis en Ukrainio en februaro 2014. Manifestacianoj kaj la polico en la ĉefurbo (Kijivo) koliziis, kaj pluraj personoj estis mortigitaj fare de la polico. La kulmino de revolucio estis la elpelo de prezidanto Viktor Janukoviĉ, la restaŭro de la Konstitucio de Ukrainio de 2004 (t.e., foriginte la modifojn de Janukoviĉ en 2010) kaj la komenco de la milito inter Rusio kaj Ukrainio.*



# Marsanoj

*Pavlo Viŝebaba*

Ni kun nia brigado antaŭeniris tra mia Donecka naskiĝregiono al la frontlinio kiel helpotrupo por niaj batalantoj, kiuj jam tenis la defendon. Kamaradoj el diversaj partoj de Ukrainujo unuafoje vidis ŝutmontojn kaj filmis ilin per siaj telefonoj.

– Karulino, rigardu, ni surmarsiĝis, kaj ni koloniigos. Marso estas ideala planedo, ĉar tie rusoj forestas, – unu el ili komentis la filmadon por sia edzino sub ridado de aliaj. La oranĝruĝaj altaĵoj vere similis al marsaj pejzaĝoj.

La suno jam estis je la nivelo de la ŝutmontoj, kio signifis, ke ni urĝe bezonas serĉi lokon por tranokti. Ĉirkaŭe estas kampoj kaj vojoj kun nudaj arboj sur la flankoj. Neniu signo de arbaro aŭ plantaro, kie oni povus starigi tendojn nerimarkeblaj por malamikaj senpilotaj aviadiloj.

La oficiroj decidis pasigi la nokton en la plej proksima loĝloko kaj pluiri ĉe tagiĝo.

Ni veturas en la vilaĝon: iuj domoj havas fenestrojn elblovitajn de eksplodondo, aliaj havas rompitajn tegmentojn, proksime de la sekvaj gemaljunuloj plantas legomĝardenon aŭ riparas plantodomon. Ni informiĝas de ili, ke la absoluta plejmulto de la loĝintoj jam estas evakuita.

La ideo loĝi en la provizore forlasitaj domoj eĉ ne venas al niaj kapoj, ni serĉas ion alian. Parto de nia grupo enloĝiĝas en eta kliniko, sed por ni restas nur unu eblo – infanvartejo.

Sur la pordo ni trovas noton ukrainlingvan, skribitan kvazaŭ speciale por ni: “Ĉiuj laborantoj de la vartejo estas evakuitaj, sed ni kredas, ke ni revenos. Se vi bezonas tranokti, bonvolu ne rompi la pordon, la ŝlosiloj estas kaŝitaj jen kie. La akvo povas esti ŝaltata jen kie (poste malŝaltu ĝin)”.

Ni malŝlosas la pordon kaj eniras. Tie estas odoro



de lakto, seĝetoj, molaj ludiloj, ludkorbetoj kaj litetoj kun blankaj littukoj. Infanoj estis ĉi tie kvazaŭ ankoraŭ matene.

Ni, kun niaj kamuflaj vestaĵoj kaj kotkovritaj armeaj botoj, kun niaj armiloj kaj nerazitaj vizaĝoj, aspektas ĉi tie kiel aliplanedanoj. Nun ni jam sentas nin kiel marsanoj, kiuj alvenis sur la komfortan Teron.

Mi eniras salonon, kie estas piano, artefaritaj floroj, rozkoloraj rubandoj kaj infanaj desegnaĵoj sur la muroj. Ĥarkivano Romĉjo sidas meze de ĉio ĉi sur seĝeto, manpreninte sian kapon:

– Uloj, ĉu tio ne konsternigas vin? Min tio konsternigas! Ĉio ĉi ne devas esti. Infanoj devas ludi ĉi tie, sed ne ni promeni kun mitraletoj. Ni nun ĉi tie difektos ĉion.

Ĉiuj havas similajn sentojn kiel Romĉjo, kaj ni, malgraŭ nia deziro vespermanĝi kaj enlitiĝi, eklaboras. Dekomence ĉiuj demetas siajn botojn. Ni trovas polvosuĉilon kaj ĉifonojn por la planklavo kaj purigas tion, kion ni jam sukcesis kotkovri per niaj piedoj. Ni volvas tapiŝojn, kunmetas ludilojn kaj litajn tolaĵojn flanken por nenion malpurigi hazarde.

En la memoro por ĉiam reflektiĝas tiu bildo. Mi faris mian laborparton kaj pianludas por la kamaradoj hazardan sontrakon al ĉi tiu superreala spektaklo. La laboro bolas je muzikakompano – iu kunigas la polvosuĉilon, iu balaas, iu portas pelvon kun ĉifono, alia levas kurtenojn sur la fenestrobreton, ankoraŭ unu volvas tapiŝojn. La fina akordo – kaj ni metas niajn dormosakojn apud la pentrita kameno de Paĉjo Karlo*.

Tiuj ĉi muroj, alkutimiĝintaj al kvieta infana nazosiblado, baldaŭ ektremas pro vira ronkado de ĉiuj eblaj tonaloj.


Mi memoras, ke antaŭ ol mi ekdormis, mi pensis, ke malantaŭ tiu ĉi pentrita kameno sur la muro povus esti pordo al unu el la variantoj de la multuniverso, en kiu sur ĉi tiu planko ne dormas soldatoj kun mitraletoj sub la kapo, sed infanoj lernas novan dancon, preparante sin por “La Printempa Festo”.

Ni ne havis tempon por lasi respondnoton kaj bedaŭris tion. Sed se ni povus, ni skribus la jenon: “Karaj infanoj, al vi venis marsanoj. Pardonu, ke unu fenestrobreto estas malintence rompita, kaj

estis nenio inter niaj marsaj iloj por ripari ĝin. Ĉio alia estis ordigita, kvazaŭ por niaj infanoj. Se vi legas ĉi tion, do la milito sur la Tero finiĝis kaj ni revenis sur Marson. Ni revas alflugi iam por viziti vian koncerton en la salono, do bone preparu vin!”

** Paĉjo Karlo: heroo de fabelo “Buratino” de A. N. Tolstoj (bazita sur Pinokjo).*

*Elukrainigis Petro Palivoda*



# Al mia filino

## *Pavlo Viŝebaba*

Nur ne skribu al mi pri la milit’,
sed ĉu belas tie ĝarden’ ĉe vi,
ĉu cikada vekas vin melodi’,
ĉu helikoj rampas sur volvokreska vit’.

Kiel homoj sur malproksima ter’
siajn katojn nomas laŭ la kutim’?
Vere ŝatus pleje mia anim’,
ke malgaj’ forestu nun en via leter’.

Ĉu ĉerizflorado ĝojigas vin?
Se donita estos al vi buked’,
ne rakontu pri fuĝ’ for de raked’,
skribu nur pri nia bona estinta viv’.

Kaj invitu gastojn al nia land’,
venu konatar’ al Ukraini’,
postmilite ilin dankegos ni:
pacon ĝuis tie nia ĉiu infan’.

*2022*

*Elukrainigis Petro Palivoda*

# Lasu min ĥo-i plu

*Jordan Zero*

Nia lingvo, la ĥimero,
Kun kapra kapo kaj leona korpo,
Havas strangan formon konstruita
Kun parto ŝajne ne kongrua.

Nenion kaj ĉion je signifas,
Kvankam tio ne estas pri kio mi pensas,
Sed la sono ĥoa, kiun ni ĥaose fortranĉas,
Kiel ĥirurgiisto kiu kuracas.

Kiel oksforda komo,
Ĥo dividas la popolon.
Do tial kiel ĥalifo aŭ ĥano kiu ĥoreografas
Kiel la homoj parolas,
La akademio eme diras,
Ke ĥo ne plu uzendas.
Kaj nun, de Ĥarkivo al Kievo,
La sono ne plu eĥas.

Sed ĥo, kiu estas nevenkebla,
Kaŝe kuŝas kiel ĥameleono,
Dum regas anarĥio literuma
Pro manko de elparolo lerta.

La simptomo de ĥo-fobio estas,
Ke ko ĥon anstataŭas.
Sed tiu teĥniko ne ĉiam funkcias,
Kiam pri aferoj sciencaj vi parolas.

Aŭ pri komenco aŭ sono,
Plej bone distingi eĥon kaj ekon,
Aŭ vi atendas respondon,
Kaj ne faras komencon.

Ĉu vi diris monarĥon aŭ monarkon?
Mi demandas ĉu mi rigardu ĉielon
Por glori la regnestron,
Aŭ la monon.

Aŭ ĉu temas pri monaĥo aŭ Monako?
Estas grava diferenco.
Ĉu vi parolas pri la asketo
Aŭ pri ŝtato plena de la malo.

Sed kio pri koruso? Mi aŭdas vin demandi.
Ĉu ne pli bone ke novajn vortojn ni devus elpensi?
Al tio mi respondas kie estas la limo?
Post iom da tempo la ĥimero eĉ pli malbeliĝos.

Do kiam tempo alvenas
Kiam vi klere klarigas
Precize kion vi intencas,
Vi ne forgesu,
Ke vin ĥo savu.
Do, mi petas, ke vi
Lasu min ĥo-i plu.

** La artikolo aperas sen ajnaj redakciaj modifoj*

# NOREK 2025

## Portlando, Oregono, la 22-24 aŭgusto

Trovu informon (anglalingvan) pri la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco, bone konata regiona renkontiĝo kiu okazas foje en Kanado, ĉi-foje en Usono.




## Virtuala Amerika Renkontiĝo Inter Esperantistoj (VARIE)

Brazilianoj kaj Kanadanoj kune decidis organizi novan eventon: la Virtualan Amerikan Renkontiĝon Inter Esperantistoj (VARIE). La intenco estas ke ĝi okazu ĉiun duan monaton. Ni esperas pliigi interkomprenon kaj amikajn rilatojn inter Esperantistoj el norda, centra, kaj suda Ameriko.

La unua VARIE okazos la 16-an de majo je la 19:00 laŭ la somera orienta horzono de Usono/Kanado. En la unua VARIE, ni aŭskultos paroladojn pri la Esperanto-movado en multaj landoj de la Amerikoj, kun muzika paŭzo de Jordan Zero, profesia muzikisto el Kanado.

Ĉiuj estas bonvenaj. Uzu ĉi tiun ligilon.

# Infana Programo dum la Dulanda Kongreso

## Vojaĝu al la DK2025 kun la infanoj!

Okazos Infana kaj Adoleska Programo dum la Kongreso en tut-esperanta medio. Estos iom da Esperanto-instruado, tamen kun amuza agad-programo (ne instruada-programo), kaj estus pli bone, ke infanoj jam parolus *iom da Esperanto*.



## Bezonata: por la Infana Programo

Ĉu vi estas proksime de Toronto kaj havas iun el ĉi tiuj aĵoj, kiujn la Infana Programo povas prunti dum 3-4 tagoj?

- Infan-Meblojn: kusenoj aŭ infanaj seĝoj por sidado, tableto por infanoj.
- Ludilojn: pilkoj, modela argilo aŭ Play-Doh, diversaj ludkostumoj.
- Artajn-provizojn: desegniloj, farbo, papero, tondiloj, gluobastonoj, glubendo, bidoj, ŝnureto por plekti brakĉenojn.
- Ekskurs-provizojn: bandaĝoj, antisepsaj viŝtukoj, *First Aid*-ilaro.
- Instrumaterialon: blanka tabulo aŭ pli-taŭge skribtabulo kiu tenus paperon, LCD-projekciilo.

## Bezonata: Helpanto

Programa Kunordiganto Parker Glynn-Adey bezonas du esperantistojn por helpi gvidi, instrui kaj prizorgi infanojn dum la Adoleska Programo.

**Por aliĝi, provizi helpilojn aŭ esti helpanto bv. kontakti kunordiganton Parker Glynn-Adey [parker.glynn.adey@utoronto.ca](mailto:parker.glynn.adey@utoronto.ca).**

# Renkontiĝoj tra Kanado en 2025 — ĉeestu!

Nia komunumo estas vigla tra la lando. Partoprenu! Ĉeestu renkontiĝon en via urbo. Se ne eblas, multaj monataj eventoj okazas virtuale... kaj ili bonvenigas novajn partoprenantojn de aliaj partoj de Kanado! Vizitu diversajn eventojn tra la lando ĉiumonate, kaj konatiĝu kun viaj samideanoj. Ni kuniĝu tra Kanado!

**Viktorio:** *Kafejo de Ideoj (Zoom).* Ĉiun sabaton, 10:00 PT. eventaservo.org/o/ViktoriaEsperanto

**Vankuvero:** *Kultura Kumziko (Zoom).* La unuan jaŭdon monate, 18:30 PT. eventaservo.org/o/EO-Vankuvero

***Vankuvera** Renkontiĝo.* La trian jaŭdon monate, 18:30 PT. meetup.com/vancouver-esperanto/

**Alberto:** *Kunvenu! (Zoom).* Ĉiun mardon, 19:00 MT, eventaservo.org/o/Esperanto-Alberta

**EO-Prerioj:** *Kumziko (Zoom).* La trian merkredon monate, 19:00 CT. eventaservo.org/o/EO-Prerioj

**NOEL:** *Ni babilu! (Zoom).* Ĉiun trian vendredon monate, 19:00 ET. northernesperanto.blogspot.com

**Toronto:** *Socia Kunveno.* La unuan merkredon monate, 18:00 ET (Loblaws Carlton St - Maple Leaf Gardens); poste restoracio je la 19h30. eventaservo.org/o/EO_TOR

**Toronto** *Konversacio por komencantoj (Jitsi).* Ĉiun dimanĉon, 13:00 ET. eventaservo.org/o/EO_TOR

**Kitchener-Waterloo** & **Hamilton**(kiel Toronto)

**Londono:** *Neformala posttagmezo de amuzo kaj konversacio.* Ĉiusabate, 12:00 ET (Tim's, Wellington Rd) meetup.com/Esperanto-London/

**Otavo**: *Konversacia Rondo Tutmonda (Jitsi Meet).* Lastan ĵaŭdon ĉiumonate, 19:00 ET. eventaservo.org/o/Esperanto-Otavo

**Montrealo:** *Ni parolu!* La duan kaj la lastan vendredon ĉiumonate, 18:00 ET (Resto VeGo, rue St-Denis). eventaservo.org/o/ESK

**Nov-Skotio** *Videkunveno (Zoom).* Ĉiun dimanĉon, 11:00 AT kun Ĉikago. eventaservo.org/o/EO_Nov-Skotio

**Halifakso**: *Esperanto-Kafejo.* La trian dimanĉon ĉiumonate (detaloj: Esperanto Nov-Skotio | Meetup | eventaservo.org/o/EO_Nov-Skotio

**Demandoj? Aldonoj al tiu listo? Skribu al informo@esperanto.ca**

# Kanada Esperanto-Asocio

**La estraranoj de KEA dum 2024–2025:**

- Prezidanto: Garry Evans — Montrealo QC
- Vic-prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Kasisto: Jordan Zero – Barrie ON (ĝis septembro 2024: Raymond Brisebois — Londono ON)
- Sekretario: Bob Williamson — Halifakso NS
- Redaktoro: Ĵenja Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Luis Obando – Toronto ON
- Estrarano: Trefleo Mercier – Ŝerbruko QC

**Adreso:**

261 Edgehill Drive, Barrie, Ontario, L4N 7W9
Kanado

**Retejo:** https://esperanto.ca/

**Facebook:** facebook.com/KanadaEsperantoAsocio

**YouTube:** youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qIug-2ng

# *Lumo*

**Redaktoro:** Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:** Bob Williamson, Francisko Lorrain, Sylvain Auclair, Trefleo Mercier.

# Esperanto-Societo Kebekia

**La estraranoj de ESK dum 2024–2025:**

- Aganta prezidanto: Joel Amis (ĝis oktobro 2024: Nicolas Viau)
- Kasisto: Garry Evans
- Sekretario: Sylvain Auclair
- Estrarano: Normand Fleury
- Estrarano: Gabriel Labrie
- Estrarano: Eveline Ménard

**Adreso:**

Société québécoise d'espéranto

6595 rue Briand, Montréal (Québec) H4E 3L4, Kanado

**Retejo:** www.esperanto.qc.ca/

**Facebook:** www.facebook.com/EsperantoQuebec

# Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi: www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado. **Estu la nova peranto de PS!**